REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU **№ 3 (34) junio 2006**

91ª Universala Kongreso de Esperanto

29 julio-5 aŭgusto 2006
Florenco, Italio



96 rusianoj jam aliĝis al la kongreso

Edistudio 050 982955

en la numero

RET kaj OkSEJT en aŭgusto apud Volgograd

imresoj kaj fotoj pri "EsPrimo-3", "Aroma Jalta" kaj EoLA-18

Renato Corsetti plantis globforman aceron en Kievo

Bronŝtejn turneis en Usono

la nova disko de JoMo

libra kalendaro de "Impeto"

omaĝe al Vladimir Gakalenko

"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdoto kaj multo alia

Moskvo 2006

enhavo:

01 RET kaj OkSEJT apud Volgograd
03 Rememorante "EsPrimon-3"
06 Impresoj pri "EsPrimo-3" en Toboljsk
07 BET-42 en Estonio julie
08 EoLA-18
10 Aroma Jalta
11 La 3-a LF en Uljanovsk
12 Evento en Ukrainio
13 Grava rekono al ekssovetia interlingvisto
14 Vladimir Grigorjeviĉ Gakalenko
16 Usonumo de Mikaelo Bronŝtejn
18 REU-Konferenco okazos dum RET
18 La temo de RET kaj niaj prioritatoj
18 Sendu viajn raportojn!
19 Vladimir Samodaj prelegis en CO
20 Reta oficejo de REU
20 Esperanto en eldonejojn!
20 Kiel ni interkonatiĝu?
21 Du novaj ĉefdelegitoj
21 Novaj REU-aliĝoj por 2006
21 Kotizoj de REU por 2006
22 Juda anekdoto de Josef Shemer
23 Lingva festivalo en Volgograd
23 Interlingvistika konferenco en Ĉeboksari
25 Esperanto-Kongreso en Sudafriko
26 Konkurso por junaj oratoroj en UK
26 Studo-tago honore al B.Migliorini
26 Letervesperu en la antikva Samarkando
27 Esperanto kaj maratono
29 Historio de scienco kaj tekniko – en la libro
29 La nova KD de JoMo
30 Liro-2006
31 "Esperanto por harfenduloj"
31 Du jaroj de kapitano Postnikov
32 Libra kalendaro de "Impeto"
34 Freŝa aero de la rakontoj
36 Esperantlingva ttt-ejo de Montpellier
36 Forpasis Guĉo kaj Talis
k3 Florenco jam atendas, Jokohamo jam allogas
k4 La uralaj esperantistoj en kanta festivalo



Renato Corsetti plantas arbon en Kievo

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 3 (34) junio 2006

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2006:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 180 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 18 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*

Florenco jam atendas, Jokohamo jam allogas

La 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco (29-a de julio – 5-a de aŭgusto 2006) estos la tria sinsekva UK kun pli ol 2000 aliĝintoj. La 8-an de junio ĝi arigis 2039 aliĝintojn el 61 landoj. Sekve ĝi jam preterpasis la 89-an UK en Pekino en 2004, kies definitiva aliĝnombro estis 2031. Dependos de la evoluo de aliĝoj ĝis kaj dum la UK, ĉu la ĉi-jara kongreso atingos la nombron de la jubilea UK en Vilno, al kiu aliĝis 2344 esperantistoj. En la historia statistiko de 91 UK-oj momente 28 kongresoj estas pli grandaj ol tiu en Florenco, kiu tamen ankoraŭ havas sufiĉe da tempo por superi plurajn el ili. Interesa demando estas, ĉu la kongreslando fine detronigos la najbaran Francion de la unua loko en la laŭlanda aliĝstatistiko. Ekde la komenco de aliĝado Francio persistas ĉe la pinto. En la plej freŝa nombrado ĝi reprezentiĝas kun 283 aliĝintoj, dum Italio liveris 254. El Japanio venos tre granda grupo por bonvenigi la kongresanojn al la venontjara UK en Jokohamo: ĝis nun aliĝis 179 japanoj. La limon de cent superas ankaŭ Germanio kaj Pollando, kun 156 kaj 124 aliĝintoj respektive. Rimarkinde multaj kongresanoj, 96, jam enskribiĝis ankaŭ el Rusio. Aliaj landoj kun pli ol 30 aliĝintoj estas Belgio (67), Brazilo (62), Hispanio (59), Litovio (50), Nederlando (43), Britio kaj Usono (po 42), Kroatio (40), Svedio (39), Ĉeĥio kaj Danio (po 38), Hungario (37), Svislando (36), Korea Respubliko (32) kaj Serbio (31).



En formo de faldfolio, konsistanta el ok paĝoj, aperis la Unua Bulteno de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la japana havenurbo Jokohamo de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2007. La kolore ilustrita folio priskribas koncize la kongreslandon kaj ĝian kulturon, la kongresan urbon kaj la kongresejon, kaj listigas la kongresajn perantojn de UEA kun ties adresoj. La Unua Bulteno estos dissendita kun la julia-aŭgusta numero de la revuo “Esperanto”, kaj ĝin trovos en siaj dokumentujoj la partoprenantoj de la ĉi-jara UK en Florenco. La aliĝilon de la 92-a UK oni distribuos en la Florenca UK kaj dissendos kun la septembra numero de “Esperanto”. La Centra Oficejo de UEA volonte sendos la Unuan Bultenon kaj aliĝilon ankaŭ al individuaj petantoj kaj por distribuado en Esperanto-aranĝoj kaj kun Esperanto-gazetoj. Post la ĉi-jara UK eblos aliĝi al la venontjara ankaŭ per reta aliĝilo en la UEA-retejo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

LA URALAJ ESPERANTISTOJ EN KANTA FESTIVALO

De la 9-a ĝis la 11-a de junio en Ĉeljabinska regiono, proksime de la urbo Miass, apud la lago Ilmenj okazis la jubilea 30-a festivalo de amatora kanto. Ĉi-foje ankaŭ esperantistoj ĉeestis ĝin. Venis entute 15 geesperantistoj el 5 urboj (Jekaterinburg, Miass, Ĉeljabinsk, Meĵgorje, Tjumenj). Ni loĝis en tendoj, kuiris la manĝadon per lignofajro, spiris freŝan aeron, naĝis en pura laga akvo kaj certe partoprenis la vivon de la tenda urbo – promenadis laŭ ĝiaj stratetoj, aŭskultis multajn aŭtorojn kaj plenumantojn de malnovaj kaj modernaj amatoraj kantoj. Super nia negranda tendareto eĉ pendis verda standardo, ĉie estis dispendigitaj flugfolioj, faritaj de Aleksandr Osincev. Fakte ĝi estis reklamo de la interretpaĝaro <lernu.net> kaj kurta informo pri Esperanto. En nia grupo eĉ sonis esperantlingvaj kantoj, ĉar kun ni estis esperantisto-gitaristo Nikolaj Terentjev.



Ĉi-foje ni nur gastis en la festivalo, sed estas reala ebleco partopreni ĝin per iu programero kun prezento de nia lingvo, belsona kaj riĉa je amatoraj kantoj. Dum nia negranda kunveno estis pridiskutita tiu ĉi ebleco. Antaŭ la festivalo ni povos organizi iun artan konkurson, kaj poste la gajnontoj (kaj ne nur) partoprenos tiun ĉi programeron. Estus bona reala propagando de la internacia lingvo. Kaj organizantoj de Ilmena festivalo promesis plani elpaŝon de esperantisoj por la sekva festivalo. Do la komunumo de esperantistoj – partoprenintoj de la 30-a Ilmena festivalo turnas sin al la rusia organizantaro: bonvolu pripensi nian proponon. Ĉi tie estas bonaj kondiĉoj: belega naturo (lago, pinarbaro, pura aero de Urala regiono), proksimeco de Ilmena rezervejo kaj mineralogia muzeo. En la tenda urbo estas rubujoj kaj necesejoj, kaj facile akireblas lignaĵoj. Interesiĝontoj reeĥu al Timofej Vŝivcev <timv@mail.ru> kaj Aleksandr Osincev <amico86@mail.ru>.



Tatjana Vŝivceva (Miass), Aleksandr Osincev (Jekaterinburg)

RET kaj OkSEJT apud VOLGOGRAD

Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-06)
46-a Okcidenta Somera Esperantista Junulara Tendaro (OkSEJT-46)

Karaj amikoj!

Ĉi-jare RET kaj OkSEJT pasos tre proksime – eĉ en la sama bazejo, sed ne samtempe – nur sinsekve. Unue pasos RET, ĝi komenciĝos la 12-an de aŭgusto kaj finiĝos la 19-an matene. En la sama tago posttagmeze startos OkSEJT, kiu daŭros ĝis la 26-a de aŭgusto. Tiu ĉi informo estas unuigita, ĉar multaj informoj estas samaj por ambaŭ aranĝoj.

LOKO

La bazejo situas apud la urbo Volĵskij (Volgograda regiono) ĉe la rivero Aĥtuba, 45 km for de Volgograda urbocentro, 8 km for de urborando de Volĵskij, 4150 m for de ŝoseo kun itineraj busetoj. Ekzistas du variantoj por atingi la bazejon: 1) de Volgograda stacidomo al Volĵskij, el Volĵskij per buseto Volĵskij-Krasnoslobodsk, elbusiĝi tuj post la ponto tra Aĥtuba; 2) de Volgograda stacidomo al rivera stacidomo, per ŝipeto al Krasnoslobodsk, de Krasnoslobodsk per buseto al Volĵskij, elbusiĝi tuj antaŭ la ponto tra Aĥtuba. Pli detalajn informojn ricevos la aliĝintoj. Ili aperos ankaŭ en la retejo <www.reu.ru>. Nepre vizitu ĝin por la plej freŝaj informoj kaj la listoj de la aliĝintoj.

LOĜKONDIĈOJ

Oni loĝos en kvarlitaj dometoj (ĉiu dometo havas fridujon kaj elektrofornon). Krome la organizantoj planas, ke estos amasejo. Oni ankaŭ rajtos loĝi en propraj tendoj. Entute estas nur 40 lokoj por la loĝado en la dometoj.

MEDIO

Aŭgusto estas bela sezono en Volgograda regiono – kutime jam finiĝas la freneziga somera ardo (ĝis 40 gradoj en julio), abundas la plej bongustaj rusiaj akvomelonoj kaj ceteraj fruktoj/legomoj. Pluvoj tre maloftas, noktoj varmas – do oni ne timu tendumadon, sed prefere ŝparu per ĝi.

MANĜOJ

La traktadoj pri tio daŭras, kaj ni esperas, ke la manĝado estos organizita – ĉu helpe de armea kuirejo, ĉu alimaniere. Alikaze ni kune surloke serĉos oportunan manieron – la nutraĵaj vendejoj ne malproksimas.

PREZOJ

La loĝado kostos ĉirkaŭ 150 rub. tage surlite en dometo, ĉirkaŭ 30 rub. tage en tendo kaj ĉirkaŭ 50-60 rub. tage en amasejo (surplanke en propra dormosako, se ni sukcesos interkonsenti pri tio). La manĝado antaŭvideble kostos ĉ. 100 rub. tage.

ALIĜKOTIZO POR OkSEJT

Ĝi estas 150 rub. por la unua aliĝperiodo (antaŭ 30.06.), 250 rub. por la dua aliĝperiodo (antaŭ 31.07.) kaj 350 rub. surloke. Gejunuloj malpli ol 17-jaraj rajtas rabaton je 50 rub., personoj pli ol 30-jaraj devas krompagi 50 rublojn.

ALIĜKOTIZO POR RET

Ĝi estas 200 rub. por la unua aliĝperiodo (antaŭ 30.06.), 300 rub. por la dua aliĝperiodo (antaŭ 31.07.) kaj 400 rub. surloke.

KOMUNE

Infanoj ĝis 10 jaroj partoprenas senpage. Se vi estas REU/REJM-membro, vi rajtas rabaton je 50 rub. La aliĝdato estas kalkulata laŭ la dato, kiam estos sendita la antaŭpago – 100 rub. al la adreso: 400064, Волгоград, ул. Рихарда Зорге 46-122, Каширину Алексею Владимировичу.

La aliĝilojn sendu al: 400040, Волгоград, пр. Ленина 76-137, Краснокутскому Анатолию Викторовичу; aŭ retpoŝte al <tolikkk@interdacom.ru>. En la aliĝilo bonvolu indiki: familinomon, nomon, patronomon, naskiĝdaton, sekson, poŝtadreson, telefonnumeron, retpoŝtadreson, lingvonivelon (novulo, progresanto, aplikanto), partoprenperiodon, elektitan loĝvarianton (en kvarĉambraj dometoj, en tendo), manĝmanieron (trifoje tage aŭ aparte ion el matenmaĝo-tagmanĝo-vespermanĝo; vegetaranoj kaj memzorgantoj memzorgas), membrecon en REU/REJM, vian deziron/nedeziron partopreni en ekskurso (prezo dependas de la kvanto de dezirantoj), vian deziron/nedeziron paraŝutsalti (se estos sufiĉa kvanto de dezirantoj, kostos ĉirkaŭ 1000 rub.), viajn proponojn por la programo.

PROGRAMO DE RET

La temo de RET estos “Kluba agado”. Oni praktikos pri kluboj kaj serioze kaj lude. La partoprenantoj kreos proprajn provizorajn E-klubojn kaj aktivos en tiuj. Kadre de RET okazos la 22-a raport-reelekta Konferenco de REU – tial parto de tiuj scioj tuj povos esti uzita praktike. Ekzemple por la elektoj de la nova Estraro de REU kaj por formado de la labordirektoj en la nova agada jaro.

PROGRAMO DE OkSEJT

La temo de OkSEJT – “vivu kolore”. Same kiel la pasintjara, tiu ĉi OkSEJT ne estos nur instrua. Ni faru ĝin pli luda, teama. Sed certe estos diversnivelaj E-kursoj. La strukturo de tendaro estos jena: al ĉiu tago estas konformigata certa koloro de la ĉielarko. Unua tago estos ruĝa, la dua – oranĝkolora ktp. Kaj ĉiu programero respondos al koloro de la tago.

BONVENIGO

La organizantoj, la partoprenantoj el diversaj urboj, bona varma vetero, bongustaj akvomelonoj, tendara etoso atendas vin. Bonvenon!



la organiza teamo

REMEMORANTE "ESPRIMON-3"

kelkaj pensoj kaj impresoj...

"EsPrimo-3" – Regiona renkontiĝo de esperantistoj de Uralo kaj Siberio "Esperantista Primavero", kiu okazis jam la trian fojon, ĉi-jare pasis en la urbo Toboljsk de la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo.

Multfoje mi aŭdis rakontojn pri iamaj regionaj renkontiĝoj REVU – "Renkontiĝo de Esperantistoj de Volgio kaj Uralo", kiuj regule okazadis dufoje jare dum la novembraj kaj majaj festoj. Oni metafore diris, ke la trajnoj "verdiĝis" pro la kvanto de esperantistoj, kiuj kolektiĝinte grandgrupe veturis trajne al Ĉeljabinsk, Permj, Ufa, Tjumenj, Kujbiŝev aŭ Sverdlovsk... Mi denove rememoris pri tio, kiam ĉi-foje nia granda 32-persona grupo veturis per trajno de Jekaterinburg al Toboljsk, kie okazis la regiona renkontiĝo "Esperantista Primavero-3". La grupon konsistigis 22 jekaterinburganoj kaj aliĝintaj al ni tri miassanoj, du ĉeljabinskanoj, tri esperantistoj el Perma regiono kaj po unu el Niĵnij Tagil kaj Meĵgorje (Baŝkirio).

Veturante en la gaja kompanio de amikoj, mi pensis, ke ĉio en la vivo disvolviĝas ondece: jen ascendo, jen denove malleviĝo, kaj tio, verŝajne, rilatas ankaŭ al E-movado. Eble lastaj tri jaroj, dum kiuj E-movado en Uralo plivigliĝis, estas komenca ŝtupo de tiom dezirata ascendo. Tiel mi revis laŭvoje al Toboljsk.

En la bazejo de junaj turistoj, kie okazis la aranĝo, ni renkontiĝis kun ceteraj partoprenantoj, kiuj venis el Tjumenj, Novosibirsk, Kogalim, Surgut. Entute estis 56 partorpenantoj. Nin varme akceptis kaj dislokis la mastrino de la

STATISTIKO. *Entute la renkontiĝon partoprenis 56 personoj el 11 lokoj: Jekaterinburg – 22, Tjumenj – 15, Novosibirsk – 4, Miass (Ĉeljabinska regiono) – 3, Ĉeljabinsk – 2, Ĉusovoj (Perma regiono) – 3, Kogalim (Tjumena regiono) – 2, Surgut (Tjumena regiono) – 2, Meĵgorje (Baŝkirio) – 1, Niĵnij Tagil (Sverdlovska regiono) – 1, Toboljsk (Tjumena regiono) – 1. Inter la partoprenantoj estis 17 viroj kaj 39 virinoj. Junularon ĝis 30 jaroj konsistigis 32 personoj, el kiuj estis 13 studentoj, 6 lernejanoj kaj 1 infano. La plej aĝa partoprenanto (R.Roganova) havis 68 jarojn, la plej juna (F.Vŝivcev) – 3 jarojn. La plej granda E-staĝo estas 34 jaroj (V.Opletajev kaj A.Kalaŝnikov). Laŭ la E-staĝo la esperantistoj dividiĝis jene: malpli ol 1 jaro – 18 personoj, de 1 ĝis 5 jaroj – 6 personoj, de 5 ĝis 10 jaroj – 6 personoj, de 10 ĝis 20 jaroj – 8 personoj, de 20 ĝis 30 jaroj – 8 personoj, pli ol 30 jaroj – 4 personoj.*


dum la ekskurso

aranĝo, toboljska esperantistino Dilara Gadirova, mirinda homo kaj unu el la plej sindediĉaj aktivuloj. Ankaŭ ĉi-foje ŝi dediĉis multe da sia energio al realigo de tiu ĉi renkontiĝo, sola ĉion aranĝis surloke: interkonsentinte pri loĝado, trovinte agrablan manĝejon kun moderaj prezoj, prizorginte tre riĉan ekskursan programon por ĉiuj tri tagoj de nia restado en Toboljsk. La ekzemplo de agemo de Dilara konvinkis min pri tio, ke se homo deziras kaj pretas fari ion valoran por sia socio, li/ŝi ne atendas aperon de helpantoj aŭ subtenantoj, sed mem povas multon sikcesi.

Kio distingis tiun ĉi regionan renkontiĝon – ĝin partoprenis pli da junuloj, inter ili multaj estis komencantoj. Konsiderante tiun fakton, la programo estis planita tiel, ke pluraj programeroj celis novulojn. Unu el konstantaj programeroj de "EsPrimoj" estas lecionoj el serio "Gutoj de lingvoscio", kiujn jam tradicie preparas kaj gvidas Vladimir Opletajev, instruisto, ĉe kiu ni ĉiuj volonte lernas kaj kiu ĉiam malkovras al ni profundecon de la lingvo. Ĉi-foje liaj lecionoj estis enhave direktitaj al komencantoj. Li atentigis belecon de la lingvo, mem parolante perfekte kaj bele. Ja ne ekzistas pli bona instruisto ol viva ekzemplo de instruisto.

Por novuloj okazis ankaŭ prezentado de esperantistaj periodaĵoj, inter kiuj estis "Esperanto", "REGo", "Scienco kaj kulturo", "Komencanto", "Juna amiko" ktp. La prezentadon faris V.Kudrjavcev.

Programero "Vojaĝu per Esperanto" konatigis komencantojn kun diversaj manieroj vojaĝi, praktikante la lingvon. Kelkaj esperantistoj rakontis alloge pri siaj vojaĝoj al E-aranĝoj dum la jaro kaj informis pri vojaĝeblecoj por la



la Tjumena pupteatra teamo

venonta somero.

Mi scias, ke kelkaj el la komencantoj, kiuj partoprenis la renkontiĝon, antaŭdemandis, ĉu ekzistas ankoraŭ homoj, kiuj parolas la artefaritan lingvon kaj ŝatis renkontiĝi kun vivaj Esperanto-parolantoj. Mi ankaŭ scias, ke kelkaj el ili timis veturi, ĉar dubis, ĉu iliaj scioj sufiĉos por komunikiĝi. Mi esperas, ke la renkontiĝo ebligis al komencantoj praktikadon de Esperanto. Ni klopodis ne altrudi ion al ili, sed komunikiĝante kiel egalaj, simple konatigis ilin kun la kampoj, kie Esperanto uzeblas. Fojfoje iuj el la novuloj trovas ion interesa kaj aliĝas al ni, mem iĝante aktivaj esperantistoj. Tiel okazis al Saŝa Osincev, kiu, lerninte Esperanton per koresponda kurso, unuafoje partoprenis E-aranĝon pasintjare printempe: REKEoLA en Jekaterinburg, post kiu li aktive engaĝiĝis en la E-movadon, vizitis pasintsomere OkSEJT-on, dum la jaro jam mem organizis kaj gvidis E-kurson en sia pedagogia universitato kaj kune kun siaj kursfinintoj jam partoprenis ĉi tiun regionan renkontiĝon. Li tre multe helpis al ni, organizantoj, kungvidinte amikan vesperon, dum gaja konkurso gvidis unu el la teamoj, aktive partoprenis diskutrondojn kaj mem organizis rondan tablon. Ĉio tio povas nur ĝojigi min!


Vladimir Opletajev rakontas pri UK

Tial pensi pri niaj E-renkontiĝoj kiel pri malgravaĵoj eble estas eraro, kiam rezulte de partopreno en ili la movadon engaĝiĝas tiaj junaj aktivuloj (temas pri apartaj opinioj, esprimitaj ĉi-rilate interrete antaŭ la renkontiĝo).

Min ĝojigis ankaŭ aktiveco de Tjumena junulara klubo. Al mi plaĉis ilia gaja kaj eltrovema prezentado dum "Amika vespero", pupteatra prezentado en la dua tago de la renkontiĝo, kaj ĉi tie laŭdojn meritis Marina Stepaĉova, kiu estis iniciatinto kaj ĉefa realiganto de tiuj ĉi aktivaĵoj.

Krome tjumenanoj, nome Pavel Veselov kaj Jevgenij Volkov, prizorgis la teknikan flankon de la renkontiĝo, organizante muzikon, komputil-servon, komunan fotadon ktp.

Tre impresis min programero el serio "Vid-al-vide", kie interesega persono, esperantisto el norda urbo Kogalim Sergeo Fedotov rakontis pri si kaj siaj multnombraj ŝatokupoj, pri tio, kiel li ellernis Esperanton, edziĝinte al esperantistino Zoja. Li havas ampleksan prinaturan fotokolekton, parton de kiu li prezentis dum la renkontiĝo.

Kaj fini miajn rememorojn kaj impresojn pri "EsPrimo-3" mi volus denove per epizodo en la trajno, sed nun jam dum la rea vojo al Jekaterinburg. Estis rimarkinde, ke ĉiuj anoj de nia granda grupo revenis kun bonaj emocioj kaj energio,

sentiĝis entuziasmo. Komencantoj sentime interkomunikiĝis kun malnovaj esperantistoj, ĉiuj longe ne volis dormi, sed vigle babilis. Mi vagadis laŭ la vagono transirante de unu babilanta grupo al alia kaj ĝoje konstatis interinfluon de esperantistaj generacioj.


agrabla tempopasigo en naturo

Al mi mem tiu ĉi renkontiĝo donacis la esperon pri plifortigo de nia regiona E-movado, kaj espereble ĝi lasos fruktodonan spuron en la animoj de la partoprenintoj.

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

IMPRESOJ PRI "ESPRIMO-3" EN TOBOLJSK

Se iu min demandos: "Kie vi estis, Saŝa?", mi respondos: "Mi estis inter amikoj". "Sed kio estas viaj amikoj?" – sekvos demando. "Miaj amikoj estas esperantistoj" – estos la respondo, kaj mi estos fiera. Kun tiuj pensoj mi revenis esperoplena el bela kaj kvieta urbo Toboljsk, la 2-an de majo, kun opinio, ke por senti, ke Toboljsk estas vere koro de Siberio, necesas proprapersone viziti ĝin. Belegaj kaj pompaj sanktejoj, renkontiĝo kun talentaj kaj bonkoraj ikonopentristoj, blankaj kolomboj sur tegmento de pola preĝejo – ĉio estas respeguliĝo de tiuj tagoj. Por mi "EsPrimo-3" estis la tria E-aranĝo en mia kurta Esperanto-vivo. Kaj tiu renkontiĝo komenciĝis por mi ankoraŭ en Jekaterinburg. Mi informis kaj varbis miajn kursfinintojn kaj iliajn amikojn. Kaj ĉio sukcesis: ni estis sepope, granda grupo de krokodiloj. Mi timigis miajn kunulinojn certigante, ke oni ne parolos kun ili dum E-aranĝo, se ili uzos alian lingvon, krom Esperanto. Sed mem mi sciis, kiel helpanto



la tjumenanoj sinprezentas

de la organizantoj, ke ni decidis fari la aranĝon porkomencante orientita.

Toboljsk bonvenigis nin per printempa suno, kaj mi ne kredis, ke tio estas Siberio. Mi prave pensis, ĉar dum du tagoj Siberio prezentis ĝuste sian kaprican karakteron. Sed tio ne gravis, mi ne rimarkis tion, ĉar mi estis inter homoj interesaj kaj energiaj, humurplenaj kaj amikemaj. Mi ankaŭ miris, kiel unu homo memstare sukcesis ĉion organizi surloke: loĝadon, nutradon, ekskursojn, kaj zorgis pri tio. Tiu homo estis nia kara mastrino, Dilara Gadirova. Grandan dankon al ŝi!

Alia flanko, pri kiu mi volus skribi, estas programo. Antaŭ kaj post ekskursoj, la tagoj estis lerte plenigitaj per interesaj lecionoj de Vladimir Opletajev, kantado, prelegoj, diskutrondoj, teatro de Tjumena E-klubo, konkursoj.

Por mi ĉio estis ne nur interesa, sed ankaŭ utila, ĉar dum la tria tago ni priparolis nian regionan movadon, tion, kion ni povas fari kune. Dankon al ĉiuj, kiuj aktive partoprenis la diskuton! Nur kune, agante loke, kunlaborante regione, pensante monde, ni povas atingi niajn celojn!

Kaj miaj komencantoj-kursanoj ankaŭ volas ion diri.

Oksana Novikova: Kiam ni, komencantoj, kiuj ankoraŭ ne kuraĝe parolis Esperante, veturis al Toboljsk, ni timis, ke oni nin ne bonvenigos, sed estis mirinde por ni – interesaj kaj bonkoraj homoj akceptis nin kiel amikojn, kaj tio – dum mia unua E-aranĝo. Bedaŭrinde, ĝi daŭris ne longe: post du tagoj, kiam la renkontiĝo finiĝis, ni revenis hejmen. Al mi tre plaĉis la programo kaj la lecionoj de Vladimir Opletajev.

Arina Osipova: Ĉio estis interesa kaj gaja: la programo, la homoj. En la trajno al Toboljsk mi ne komprenis preskaŭ eĉ unu vorton esperantlingve, ĉar mi ne partoprenis kurson kaj aliĝis kune kun amikino pro intereso, sed post du tagoj dum la rea vojo mi preskaŭ ĉion komprenis, kion oni parolis. Finfine restis bonaj emocioj kaj deziro eklerni Esperanton.

Sveta Godireva: Kio al mi plaĉis? – La lecionoj de Vladimir Opletajev, ekskursoj. Kio ne plaĉis? – Dum du tagoj mi ne sukcesis konatiĝi kun ĉiuj.

Aleksandr Osincev (Jekaterinburg)

BET-42 EN ESTONIO JULIE

Baltaj Esperanto-Tagoj okazos ĉi-jare en Kuressaare, sur la insulo Saaremaa, Estonio dum 04-08.07.2006. La strukturo de la programo estos tradicia, kompreneble ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj. La temo de la renkontiĝo estas “Unueco kaj diverseco de la popoloj ĉe la Balta maro”. BET-42 okazos en la ejoj de la gimnazio de Kuressaare, Hariduse strato 13. Loĝejofertoj estas jenaj: 1-loka ejo en la gimnazia loĝejo por 5 noktoj: 78 eŭroj, 2-loka por 5 noktoj: 54 eŭroj, 4-loka: 42 eŭroj. Entute la loĝejo havas 75 lokojn. Veturi al Saaremaa eblas per aŭtobuso, pramŝipo kaj aviadilo, same per propraj aŭtoj. En la programo estas antaŭvidataj: Interkona vespero, Somera Universitato, Nacia Vespero, Ekskursa tago, Amuza Vespero, Konkurso “Kannel” (aktorado, kantado, deklamado, dancado), Adiaŭa Balo. Pliaj informoj – ĉe <esperant@hot.ee>.

(esper-inform)

EoLA-18

De la 29-a de aprilo ĝis la 03-a de majo en Jelec okazis la tradicia festivalo "Esperanto – Lingvo Arta" (EoLA-18). En la aranĝo partoprenis 42 personoj el 8 loĝlokoj: Moskvo kaj Moskva regiono (15), Jelec (11), Volgograd (6), Lipeck (4), Niĵnij Novgorod (3), Dimitrovgrad (1), Rostov-na-Donu (1), Nederlando (1).

Laŭ surloka decido de la organizantoj, la artaj konkursoj ne okazis. La artan parton de la programo konsistigis kelkaj metiejoj, prelegoj pri moderna arto, literatura rondo, pupteatra prezento, kelkaj mallongaj teatraĵoj, teatreca konkurso "Tandemo" kaj tri koncertoj (de Mikaelo Povorin, de Jelena Melnikova kaj la komuna). Krome okazis Interkona vespero, ekskurso tra la urbo, progresiga kurso, multaj ludoj, instruado de kantoj, librobutiko.

Grandan dankon al la jelecanoj, kiuj multajn fortojn kaj tempon dediĉis al la preparo kaj okazigo de la festivalo! (La ĉeforganizantoj Daŝa kaj Seva Ivaniŝĉenko okupiĝis pri la festivalo, havante kvarmonatan infanon!)

Por ke la legantoj de REGo havu pli adekvatan impreson pri la aranĝo, mi prezentu ĝin per la fotoj kun klarigaj subskriboj.

Garik Kokolija (Moskvo)



Irina Gonĉarova demonstras eron de sia kurso FaRo – parkerigo de E-vortoj kun helpo de bildoj



sinprezento de la mastroj-jelecanoj



kantas Helena Melnikova



kantas Mikaelo Povorin



Daŝa Ivaniŝĉenko organizas gajan ludon



vortludo en la amasejo



la plej junaj partoprenantinoj – Bella Kozlova el Niĵnij Novgorod kaj Veronika Meĥrjakova el Lipeck



tiu ĉi paro en la konkurso "Tandemo" konkurencas, rolante dekstran kaj maldekstran okulojn



ventrodanco en la plenumo de Viktorija Dronova el Volgograd



la partoprenantoj, kiuj dum la festivalo preparis kaj en la adiaŭa vespero montris pupteatran spektakleton


Ivo Miesen ne ŝanĝas siajn ŝatokupojn – biciklado kaj fotado


la plej lasta programero – tradicia Amika rondo

AROMA JALTA

Komence de majo en Jalta, Krimeo, okazis la vica, jam 18-a "Aroma Jalta", la plej multnombra kaj plej alloga el ukrainiaj renkontiĝoj. Ĝin partoprenis 106 personoj el 32 loĝlokoj de 9 landoj. La programo, kiel ĉiam, imponis pro sia denseco. Plej grava avantaĝo ĝuste de tiu renkontiĝo estas, ke en ĝi harmonie interplektiĝas kaj seriozaj, kaj distraj programeroj.

Tre forta, kiel kutime, estis la instrua parto de la programo. Okazis trigradaj kursoj (porkomencanta, paroliga, perfektiga), kies partopreno estas deviga. Ĉi-foje, fakte, oni povus eĉ ne anonci tion: bonega prepariĝo kaj verva, interesokapta prezento de lecionoj far junaj E-instruistinoj Anna Dubrovina (Kievo) kaj Oljga Gribovan (Tiraspolj –"Verdaĵo", Odessa) faris la kursojn tiom allogaj, ke al la kursanoj eĉ ne venis ideo iel eviti la lecionojn. Male, la publiko eĉ pligrandiĝis dank' al talento de tre promesplenaj intruistinoj. Nu, en perfektiga kurso, gvidata de mi, ĉio estis solida kaj serioza, sed ŝajne, ankaŭ tie oni ne suferis.

Saĝa propono por ĉi jaro – okazigi la Universitaton ne vespere, sed tagmeze – alportis siajn fruktojn. Ni ĝuis tre valorajn prelegojn de Prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti, "Stato de Esperanto en la mondo" kaj "Ĉu la suno leviĝas okcidente? Modelo de organizaĵoj en la unuopaj socioj fare de esperantistoj"; tiujn de Paŭlo Moĵajev pri akuzativo kaj de Floarea Popa pri E-movado en Rumanio, kaj la mian pri biodiverseco. Ĉiam la publiko aŭskultis kun intereso, do, ankaŭ tiu programero estas bezonata.

Ankaŭ kunsidoj de Ukrainia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ULEI) kaj Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ) okazadis tagmeze kaj kun kvorumo. En la kunsido de ULEI estis proponita kandidaturo de V.Hordijenko kiel reprezentanto de ULEI por la ILEI-Konferenco ĉi-jara en Parma, Italio. En la kunsido de ULEJ estis elektita nova ukrainia reprezentanto ĉe TEJO – Katja Semjonova (Berdjansk), kaj elektita nova estraro de ULEJ: prezidanto Andreo Koval (Kievo) kaj la ano Igor Glagolevskij (Odessa).

Nu, la ekskursa programo pompis, kiel ĉiam: Livadia, Alupka, Massandra palacoj, Hirunda nesto, Aj-Petri; piedmarŝoj al Urso-monto, akvofalo Uĉan-Su, kaj



grandegaj turistaj marŝoj: unutaga al Baĥĉisaraj kaj dutaga al akvofalo Ĝur-Ĝur. Kvankam la vetero estis malvarma kaj ofte pluva, Jalta ja restas Jalta, belega subtropika urbo kun cedroj kaj cipresoj, magnolioj kaj jasmeno, kies aromoj donis eĉ la nomon por la aranĝo.

Se io estis dum AJ-18 signife pli bona ol antaŭe, tio estis artaj vesperoj. Ne temas pri la prezentantoj: kaj Paŭlo Moĵajev, kaj Oĉjo Ĉajka; kaj Katja Semjonova kiel organizanto de Interkona Vespero kaj Klubo de gajaj kaj spritaj; kaj Jefim Zajdman kiel la animo de Jalta vespero, kaj eĉ miaj Intelektaj Ludoj kaj videofilmoj en Esperanto, kreitaj de Odesa junulara E-klubo "Verdaĵo" estas jam konataj al la popolo kaj plurfoje prezentitaj dum "Aromaj Jaltoj". Sed ĉifoje gravis ne nur prezentantoj, sed ankaŭ la publiko kaj ties varma akcepto, sincera interesiĝo pri la koncertoj.

Mi povus diri, ke la nuna AJ estis la plej trankvila kaj varmanima el multaj; eble, pro malvarma vetero la varmo de niaj koroj kunigis nin? Tre varma kaj kortuŝa estis Adiaŭa Vespero, kun granda koncerto de poloj, gvidataj de Daniela Elmer, kvizo pri Aromaj Jaltoj, Hejma teatro kaj aliaj laŭplaĉaj okazintaĵoj.

Ni ĉiuj revenas al niaj urboj... sed sekvajare nepre okazos Aroma Jalta, kaj denove renkontiĝos tie amikoj.

Ĝis revido, karaj!

Tatjana Auderskaja (Ukrainio)

VIZITO AL FABELO

la 3-a Lingva Festivalo en Uljanovsk

La sindona Johannes, la belega Rapunkolo, Gelsomino, Gajulo el Falkenborg, Princino Lindagull, la fidela Ĉĵu In-Taj... Kio unuigas ĉi tiujn enigmajn kaj strangajn nomojn? Ĝuste. Ĉiuj ili estas personaĵoj el fabeloj de diversaj landoj: Germanio, Italio, Svedio, Finnlando kaj Ĉinio. Tute ne hazarde ĉiuj ili trafis unu lokon kaj unu tempon. La 25-an de marto 2006 en Uljanovska pedagogia universitato okazis festo de fabeloj, alivorte la 3-a Lingva Festivalo, kiun organizis la fremdlingva fakultato de la universitato kaj Uljanovska Esperanto-klubo. Ĉiu, kiu vizitis ĝin, ricevis multe da neforgeseblaj impresoj kaj fortan energian impulson. Ekscii pli multe pri aliaj popoloj, kunesti kaj fotiĝi kun reprezentantoj de multaj nacioj, partopreni lingvajn ludojn kaj gustumi macon kaj "ĉak-ĉak" – kio povas esti

pli bona, kiam printempo ankoraŭ ne ĝojigas nin per varmaj tagoj, kaj ni havas deziron levi nian humoron! La Lingva Festivalo donis tiun eblecon, kaj ni esperas, ke ĉi tiu tradicio daŭros plu.

Tamen kiel malsimple ĉio komenciĝis! Sendormaj noktoj, serĉado de reprezentantoj de diversaj landoj kaj deficito de monrimedoj turmentadis la organizantojn. Sed nuntempe la Festivalo havas jam malnovajn amikojn kaj novajn konatojn, kiuj bruliĝis per la ideo doni sian parton al kultura evoluo de la universitato kaj la tuta urbo. Laŭ vortoj de studentoj el Tunizio kaj Jemeno, la bonvoleco kaj bona atmosfero, kiuj regas en la Festivalo, allogas ilin, tial ili venas ĉi tien denove kaj denove. Ĉi-jare la festa programo vastiĝis. En la fina koncerto partoprenis pli multe da ensembloj el diversaj artaj kaj ĝeneralaj lernejoj. Kaj ĉi tio atestas kreskantan popularecon de la Festivalo inter junularo, kaj sekve stimulas organizi ĝin ankaŭ sekvajare. Speciale ni devas mencii meritojn de studentoj, kiuj ebligis al ni mergiĝi en fabelan mondon kaj konatiĝi kun diversaj popoloj.

Ni esperas, ke tia rimedo, kiel Lingva Festivalo, faros nin bonaj kaj toleremaj al diversaj nacioj, kaj ankaŭ instruos nin ami kaj estimi unu la alian.

Jelena Mitrofanova (Uljanovsk)

EVENTO EN UKRAINIO

La 2-an de majo laŭ invito de Societo por subteno kaj defendo de ukraina kulturo “Espero” por partopreni en Solena Enmanigo de projekta dokumentaro de Ĉirkaŭmonda Karavano “Interkulturo”, kies kunorganizanto estas la Societo, venis la Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio s-ro Renato Corsetti kaj la Prezidanto de Pola Esperanto-Asocio s-ro Stanislav Mandrak.

Sekvatage en Parko de Amikeco okazis lanĉo de la Aleo “Esperanto”. La unuaj tri arboj (globformaj aceroj) estas plantitaj de s-roj R.Corsetti, S.Mandrak kaj M.Lineckij (kiel gvidanto de Societo “Espero” kaj Prezidanto de E-klubo KARE). Apud ĉiu arbo estis metita teksta tabuleto en la ukraina kaj Esperanto kun la nomo kaj la posteno de la plantinto. En la aranĝo ĉeestis ankaŭ esperantistoj el kelkaj ukrainiaj urboj. Kun ĵurnalistoj de kieva televidkanalo “TRK-Kiev” okazis informriĉa interparolo, kiu transformiĝis en bonan kaj tre pozitivan televidprogrameron. Estis filmitaj sufiĉe grandaj intervjuoj kun R.Corsetti kaj M.Lineckij. La registraĵo estis elsendita kelkfoje la saman tagon en programo de novaĵoj kaj ripetita la sekvan mate-



Mikaelo Lineckij kaj Renato Corsetti respondas al la demandoj de ĵurnalistoj

non. Do, ni rajtas gratuli nin okaze de apero de nova – la sesa – ZEO en nia lando!

Post pieda ekskurso tra la urbo kaj tagmanĝo la altaj gastoj venis en Muzeon "Ĉernobilj", kie okazis la ĉefa evento de tiu tago. La krea Unuiĝo "Gaudeamus", kies gvidanto estas Vladimir Soroka, kolektis sub tegmento de la Muzeo dekojn da reprezentantoj de sociaj organizaĵoj, kulturagantojn kaj ambasadanojn de kelkaj landoj por Ceremonio de Solena enmanigo de projekta dokumentaro pri Ĉirkaŭmonda Karavano "Interkulturo" al la Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio s-ro Renato Corsetti.

Dank' al granda helpo de samideanoj el diversaj landoj estas preparitaj tradukoj de tiu dokumentaro al la germana, itala, pola, makedona, hebrea kaj angla lingvoj. Certe, estis prezentitaj ankaŭ la ukraina kaj rusa variantoj. La priskribo de la projekto estis farita bonkvalite kaj prezentita duforme: KD (slajd-filmo kun muzika akompano de la teksto) kaj ĝia printita varianto en altnivela dekoro.

Krom R.Corsetti, S.Mandrak, V.Soroka kaj M.Lineckij, inter la parolantoj en la ceremonio estis Gvidanto de Krea konsilio de Ĉirkaŭmonda Karavano "Interkulturo" en Ukrainio elstara ukrainia aktorino Raisa Nedaŝkivska; direktorino de liceo № 38, prezidantino de Asocio de direktoroj de lernejoj en Ukrainio I.P.Kozina; direktorino de centralizita biblioteka sistemo de Desnjanskij distrikto de Kievo T.I.Kurilo; kaj pastro kaj kanceliero de grek-katolika eklezio patro Serhij – la fama ukrainia esperantisto Serhij Prudko. Por partopreno en la Ceremonio estis akreditataj ĵurnalistoj de diversaj eldonaĵoj kaj televid-kanaloj. Post la oficiala parto de la aranĝo okazis tre impona koncerteto.

Tiu ĉi aranĝo evidentiĝis tre alloga por multe da "flankaj" por Esperanto homoj, kiuj tuj arde ekinteresiĝis pri ĝi kaj esprimis la deziron lerni la lingvon. Inter ili estis, ekzemple, direktorino de iu el kievaj elementaj lernejoj, kiu jam decidis lerni Esperanton mem kaj enkonduki ĝin kiel fakultativon en sia lernejo, profesoro de Kieva Universitato nome de T.Ŝevĉenko, por kiu ege grava estis rolo de Esperanto en subteno kaj defendo de ukraina kulturo.

Por havi kompletan imagon pri la Projekto "Interkulturo", vizitu ĝian trilingvan ttt-ejon <www.interkulturo.info> (en Esperanto, en la rusa kaj en la ukraina)!

Eugenia Slovaĉevskaja (Ukrainio)

GRAVA REKONO AL EKSSOVETIA INTERLINGVISTO

La aŭtoro de la referenclibro "Internaciaj helpaj lingvoj" kaj pluraj aliaj interlingvistikaj verkoj, iniciatinto de la serio "Interlinguistica Tartuensis", Internacia Interlingvistika Asocio kaj katedro pri slavaj lingvoj, profesoro de la Tartua universitato Aleksandr Dmitrijeviĉ Duliĉenko iĝis laŭreato de la t.n. "malgranda Nobel-premio" por lingvistoj kaj filologoj – Humboldta premio. Ĝis nun tiun premion honoris havi nur 2 (eks)sovetianoj: J.D.Apresjan kaj A.A.Zaliznjak. Elkorajn gratulojn, Aleksandr Dmitrijeviĉ!

Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu)



VLADIMIR GRIGORJEVIĈ GAKALENKO

(1939 – 2006)

Aprile venis al ni funebra informo: la 1-an de marto forpasis Vladimir Grigorjeviĉ Gakalenko. Forpasis subite, senatende, lasinte nefinfaritan kolosan aferon – lia organismo, absolute sana, trejnita, fortika ebligis lanĉi longtempajn projektojn. Perfidis lin la koro…

Vladimir Gakalenko estis konata kaj alte aprezata en sia eksterespa vivmedio, ĉar en li paradokse kunfandiĝis ekstrema pedanteco kaj lerta humuro, postulemo enofica kaj kapablo animigi ĉelignofajran vesperon. Sed antaŭ ĉio cetera li estis persono senriproĉe honesta kaj bonkora. Spertega fakulo pri veldado, li dum multaj jaroj gvidis gravan buroon en ĉefveldista fako de la Tiĥvina filio de la fama Kirovskij-uzino. Fakuloj plej aŭtoritataj, konfrontante malfacile solveblan problemon petis lian helpon. Sed, malgraŭ la respondeca posteno, Vladimir mirakle sukcesis eltrovi temperojn por multaj hobioj. Havante nemalgravan pentrokapablon kaj verkemon, li konstante redaktis-preparadis murgazeton de la fako. Ne malpli ol pri veldaj aferoj li spertis pri la turismaj kaj estis multjara prezidanto de Tiĥvina turista klubo, tiutempe tre amasa kaj renoma en la lando. Turistaj marŝoj, inspirataj de li, ĉiufoje havis senriproĉe pripensitan itineron, modelan organizon kaj mirinde koheran kompanion. Por Vladimir ne ekzistis malgravaĵoj, li emis primediti ĉion detale. Se li estis paŝanta kun kompaso en nekonata loko – estu ĝi sovaĝa arbaro, danĝera marĉo aŭ serpentuma riverbordo – li ne nur desegnis la tutan itineron en sian notlibron, sed ankaŭ kalkulis distancon per tripaŝoj! Bonega metodo, postulanta konstantan streĉitecon, sed donanta tuj tre precizan rezulton en metroj…

El la senĉesa vivofluo la homa memoro faras aron da lumbildoj koloraj kaj nigrablankaj. La amara informo igis nin denove trarigardi tiujn, ligitajn kun esperantisto Volodja Gakalenko. Volodja li estis por ni en la klubo.

Li venis al Esperanto dufoje. La unuan fojon, liadire, estante studento. Li trovis lernolibron, entuziasmiĝis, sed iu estiminda persono el lia tiama rondo diris al li kutimajn aĉaĵojn – ke la lingvo estas morta, sentaŭga, kaj ke li ne perdu tempon por ĝi. La dua veno, jam porviva, okazis en 1972, kiam ricevinte pozitivajn informojn li sen ies trudo, nur per propra meditado rekonvinkis sin mem. Tiel Esperantujo akiris treege utilan kaj fidelan anon.

Diri, ke li aktivis en Esperanto-klubo, signifas diri nenion. Volodja naĝis en la lingvaj okupoj, ĝuante la naĝadon. Lia pedanteco montriĝis tute konvena por la

ĉefa laboro, elektita de li – la vortarista. Kune kun Aleksandro Kogan li establis firman kontakton kun kanadano Rüdiger Eichholz, fakulo pri terminologio Esperanta. Miloj kaj miloj da slipoj estis faritaj propramane de Volodja. La samaj lertaj manoj produktis por klubaj bezonoj en 1980 Esperanto-rusan vortareton kun 2000 vortoj; mankis tiam la moderna tekniko, do ĉio ĉi estis plej akurate manskribita, multobligita kaj broŝurita de Volodja. Tiamaj klubaj albumoj, murgazetoj kaj ekspozicioj vere ne okazus sen lia laboro. Li aktive korespondadis, gvidis Esperanto-kurson por lernejanoj. Kelkcento da partoprenintoj de SEJT-18 en Tiĥvin (1976) memoras lin kiel unikan ĉefon de la turista Paroliga Periodo, tre sukcesa kaj absolute neforgesebla…



En 1992 pro malsano de la patrino Volodja transloĝiĝis al Jevpatoria, Krimeo. Konstanta korespondado kun anoj de Tiĥvina klubo tamen daŭris ĝis la fino. Ni bone sciis, ke Volodja, ne havante financan eblecon partopreni amasajn aranĝojn, tamen plu fervore okupiĝas pri sia revo – preparado de laŭtemaj fakvortaroj.

Antaŭ jaro li petis nin peri lian mendon: li aĉetis de UEA-libroservo stokon da grandaj vortaroj. Jam en 2006 januare, ricevinte informon pri la granda rus-Esperanta vortaro de Boris Kondratjev, li skribis, ke antaŭ multaj jaroj estis lia revo fari tiaspecan vortaron, sed nun li opinias, ke tamen altnivelaj fakvortaroj pli gravas por progreso de Esperanto en la moderna mondo. Do li estis preparanta tiujn vortarojn. La senkompata morto ĉesigis la sindonan laboron…

эсперанто-
русский
словарь

Около 2000 слов

Составил В.Г.Гакаленко

1980

Estas vere feliĉa bonŝanco, ke ni vivis apud Volodja, tiu mirinda kaj admirinda homo, amikis kun li, laboris kune. Al sia lasta mesaĝo Volodja kroĉis la foton, faritan ĉe la bordo de la Nigra maro. La jaroj pasintaj sulkigis lian vizaĝon, sed lia rigardo – varma, bonanima – restis tia, kia ĝi estis en la junaĝo. Ĝuste tia li restas en niaj koroj.

Vera kaj Viktor Kandalinskij (Tiĥvin)



en la "Ŝikaga" E-klubo

MIA NELONGA USONUMO

Ne, ne tedis min Eŭropo, sed konvena situacio ĵetis min trans Atlantikon. Por nelonge, tamen ĝi estis nekutima, nova kaj agrabla sperto.

Antaŭ jaro mia kuzo, jam dum dek kvin jaroj loĝanta en Usono, ekdeziris gastigi min, pripagonte mian flugon ĉe okazo de mia konsento. Iom longe mi primeditis la proponon sed fine jesis. Do, unuavice mi danku mian kuzon por la ŝanco viziti Usonon, kiun li donacis al mi.

Informinte la kuzon pri mia konsento, mi informis ankaŭ Esperanto-Ligon de Norda Ameriko (ELNA) pri la eventuala veno kaj proponis prelegojn/koncertojn por dezirantaj kluboj en Usono. Aro da kluboj entuziasmiĝis kaj invitis min, sed… Usono estas lando grandega, kaj la flugo, ekzemple, el Novjorko al San-Francisko kostas mil dolarojn! Pro tio mi humile petegas indulgon de miaj afablaj invitintoj en Atlanto, New Mexico, San-Francisko kaj aliaj foraj lokoj, kiujn mi ne vizitis. Espereble, alifoje. Nun mi devis limigi min nur enkadre de la nordaj ĉeatlantikaj regionoj… kvankam la vorto "nordaj" estas iom nekonvena el rusia vidpunkto. Ĉar latitude la regionoj vizititaj egalas Mezazion aŭ Kaŭkazion.

Do. Dum la lasta aprila semajno okazis tri prezentadoj por esperantistoj – en Novjorko, Cleveland kaj Ŝikago (ĝuste tiel elparolas lokanoj), kaj du – por ekstera publiko: en Ŝikago kaj Bayonne. Ĉar en la du lastaj mi parolis pri kaj kantis en Esperanto, ankaŭ (aŭ des pli) tiuj utilas. Krom tio mi diru, ke en Usono fakte okazis la unuaj publikaj prezentadoj de la nova kodisko "Printempo bluĵinsa", varme akceptita de la publiko. Ĝenerale, la neamasa (ho ve!), diversetna usona esperantistaro kiel publiko estas simpatia, komprenema, afabla kaj tre sincera. Kiel atesto venu nur tri el multaj opinioj de miaj aŭskultintoj en Ŝikago; mi kopiis tiujn el la ĵus aperinta "Saluton!"[1] № 5:

La kantoj, libroj, kaj vigla parolado de Miĉjo alportis al mi la memorojn pri somero de 1965, kiam mi sola trapasadis Ruslandon kaj Siberion survoje al la UK en Tokio. Tiama Soveta Ruslando ŝajnis al mi tute senespera kaj sen-Esperanta. Mi ne konsciis, ke mi estis paŝanta tra la lando riĉa de junuloj aktivontaj en izoliteco. Ho, ili havis eĉ kaŝajn esperantistajn tendarojn, kunvenojn, pri kies okazo la eksterlando ne sciis! Kaj ili ne havis eblecon vojaĝi eksterlanden, eĉ kun Esperanto... Sed la iama inkubatoro de la verdaj talentoj, kiel tiu de Miĉjo, evidente riĉe fruktis. Gratulon al la aŭtoro kaj artisto, kun sinceraj deziroj al li de pluaj vojaĝoj kun kaj per Esperanto! ***(Leszek Kordylewski)***

[1] *Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago*

Mian opinion pri la koncerto de Mikaelo Bruna Ŝtono oni povas taksi unuvorte: mizera. Kiam mi legis la anoncon pri la koncerto mi esperis almenaŭ malgrandan orkestron kaj kantiston kun bela voĉo, sed anstataŭ tio mi vidis kantiston kun malforta voĉo kaj mizere akompanianta gitaro. Tamen mi admiris lian belan Esperanton! ***(Walter)***


en la Novjorka klubo

... mi ege ŝatis programon de sinjoro Bronŝtejn... li parolis facile... kaj liaj paroloj kaj poemoj estis pri AMO... dolĉa afero por homoj... Dankon! ***(Sapideh)***

La dua semajno de mia usonumo estis pure ekskursa, kelkajn ekskursojn mi havis ankaŭ dum la turnea periodo. Ĉiuj lokoj vizititaj estas sendube vizitindaj kaj kelkaj eĉ vizitendaj, i.a. nepre la muzeo de rok-muziko en Cleveland aŭ aeronaŭtika muzeo en Vaŝingtono. Sed ne nur tio! Novjorko, kiel la tutaĵo, kaj aparte – almenaŭ unu muzikalo en Broadway. Armilfoiro en Virginia kaj pafado el aŭtenta "Beretta". Brighton-beach – la eta Odeso en Novjorko, kaj Ukraina vilaĝo en Ŝikago. Bahai-templo en Ŝikago, kie, bedaŭrinde, la librejo estis fermita, do mi ne akiris la libron pri Lidia Zamenhof. La konsterna "Ground Zero"…

Indus raporti ankaŭ pri usonaj kutimoj, tute nekutimaj por eŭropano, i.a. pri benzino pergaljona, distancoj permejlaj, viando perfunta kaj temperaturo perfarenhejta… La impresoj superplenigas min, sed mi lasu ilin veni poste – poem- aŭ kantforme. Nun mi nur plenumu mian devon – tutkore danku la afablajn gastigantojn kaj organizantojn de mia kurta restado en Usono, inter kiuj miaaĝaj legantoj facile trovos la nomojn treege konatajn. Koran dankon al Neil Blonstein, Puramo Chong, Jerzy Dobrzynsky, Gregory Dolgin, Phil Dorcas, Tomas Goodman, Alex Karkovsky, Boris Kolker, Naum Kopman, Viktor Payuk, Sofiya Soskina, kaj nepre al du kabeintoj sed amikoj de mia infaneco – Michael Lerner kaj Isaac Tsimmerman. Cetere, la lastaj troveblas en la foto de E-kurso (en la unua vico), lokita en la lasta eldono de "Legendoj pri SEJM". La foto aĝas jam 45 jarojn, do certe, la personoj iom ŝanĝiĝis. Sed ne gravas.



la junaj esperantistoj en Ĥmeljnickij en 1961

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

Bulteno de REU

REU-KONFERENCO OKAZOS DUM RET

La 22-a raport-reelekta Konferenco de REU ĉi-jare okazos kadre de Rusiaj Esperanto-Tagoj. La Konferenco pasos la 15-18-an de aŭgusto 2006 (RET okazos dum la 12-19-a de aŭgusto) apud la urbo Volĵskij, Volgograda regiono. Ordinare la Konferenco okazadis dum REK (Rusia E-ista Kongreso), sed la nuna Estraro de REU decidis eksperimente ne okazigi REK-on ĉi-jare. La espero estas, ke okazigo de la Konferenco ene de la ĉefa somera aranĝo de la Unio helpos al ni ĉiuj alproksimigi la agadon de REU al la praktikaj bezonoj de la rusia E-movado.

Ĉiuj membroj de REU, kiuj ne sukcesos pro eksteraj kialoj partopreni la Konferencon, estas invitataj sendi siajn proponojn pri la estonta agado de REU rete al la adreso de la prezidanto <prezident@reu.ru> aŭ poŝte al: p/k 57, 105318 Moskvo. Al la samaj adresoj vi povas sendi vian kandidatiĝon, se vi dezirus kandidati por la nova Estraro de REU. Tiaj kandidatiĝoj plene validas kaj ĉiam estas traktataj same serioze kiel tiuj de la ĉeestantoj.

LA TEMO DE RET KAJ NIAJ PRIORITATOJ

"Kluba agado" – tian temon la organizantoj decidis preni por Rusiaj Esperanto-Tagoj en 2006. La temo estas kunligita kun la proponata prioritata agado por REU en la sekva laborjaro. Dum la antaŭa Konferenco en Jekaterinburg, la partoprenintoj per eta plimulto akceptis *informadon* kiel la ĉefan prioritaton por la ĵusa laborjaro. Kaj la vican laŭprioritate *regionan agadon* oni rekomendis por la sekva periodo. Certe la finan decidon pri tio akceptos la estonta Konferenco. Sed dum validas la rekomendoj de la antaŭa Konferenco, la Estraro de REU decidis agi konforme al ili. Unu el tiaj "konformaj" decidoj estas, ke po unu reprezentanto de ĉiu REU-klubo rajtos aliĝi al RET senpage.

SENDU VIAJN RAPORTOJN!

Ĉiuj rusiaj E-kluboj kaj grupoj (ne nur la aliĝintaj kolektivoj de REU) estas invitataj kontribui al la programo de RET, alsendante raportojn kaj rakontojn pri sia agado en la periodo inter junio 2005 kaj majo 2006.

Tiuj raportoj estos uzitaj por la kompilado de la tradicia "Ranglisto de kluboj". Granda diferenco de la Ranglisto disde la iama kluba konkurado, populara dum la sovetia tempo, estas, ke se iu klubo ne raportas, ĝi tutegale trafas al la Ranglisto – laŭ la posedataj informoj el la reto, E-informiloj kaj eĉ onidiroj...

Ĉi-jare la Ranglisto estos elkalkulata maksimume malfermite, kun partopreno de ĉiuj interesiĝantoj. La plej aktivaj kluboj tradicie ricevos premiojn de REU.

VLADIMIR SAMODAJ PRELEGIS EN LA MALFERMA TAGO

Plena cento da vizitantoj plenigis la domon de UEA en Roterdamo sabate, la 13-an de majo, kiam por la 24-a fojo okazis Malferma Tago de la Centra Oficejo. Nur unufoje antaŭe la "printempa" Malferma Tago altiris pli da vizitantoj: en aprilo 1998, kiam ĝi estis dediĉita al la 90-jariĝo de UEA.

Kvankam ĉi-foje ne temis pri iu ronda datreveno, la prelegoj de la tago tamen havis historian karakteron. Stefan Maul, konata antaŭ ĉio kiel la ĉefredaktoro de la Deguĉi-premiita revuo "Monato", parolis pri siaj riĉaj spertoj kiel Esperanta ĵurnalisto. Kadron por lia prelego prezentis lia libro "El verva vivo ĵurnalista", eldonita de Flandra Esperanto-Ligo pasintjare. Maul kontribuis al la programo ankaŭ sub tute alia ĉapelo, tiu de profesoro Ruĝnazul', kiu katenis la publikon per sia humurplena prezento. La surpriza gasto Vladimir Samodaj, profesie ĵurnalisto kiel Maul kaj krome honora membro de UEA, prelegis pri la Esperanto-movado en Sovetunio kaj Rusio de la 60-aj ĝis la 90-aj jaroj kaj prezentis la Esperantan revuon "Scienco kaj kulturo", kiun li redaktas.

Paralele kun la prelegoj estis montrataj filmoj. Petro Balaz prezentis premiere la filmon "Vizito al la Centra Oficejo", kiun li reĝisoris kaj kiu plejparte estis filmita en la lastnovembra Malferma Tago, kiam la Centra Oficejo festis la 50-jariĝon de sia translokiĝo al Roterdamo. La hispana artisto David Maroto montris filmregistraĵon de kvizo, kiu okazis en marto dum la Muzea Nokto de Roterdamo. La ne-esperantista publiko aŭdis tiam legadon de Esperanta traduko de romano de la argentina verkisto Adolfo Bioy Casares kaj devis diveni la lingvon.

Grava ŝanĝo kompare kun la antaŭaj Malfermaj Tagoj estis, ke la prelegoj ne plu okazis en la ĝisnuna konferencejo, ĉambro Zamenhof, kiu estis ilia scenejo ekde la unua Malferma Tago en novembro 1994. Intertempe ĝi estis rekonstruita por fariĝi la ejo de Biblioteko Hector Hodler, kaj ĝin plejparte jam okupis novaj rulŝrankoj, sur kies bretojn baldaŭ translokiĝos la materialoj de la biblioteko. La prelegoj okazis en la ĝisnuna bibliotekejo, ĉambro Kanado, kaj la filmojn oni spektis en la libera areo de la nova bibliotekejo.

Kiel ĉiufoje, la libroservo plenis de klientoj la tutan tagon. Kun 14 venditaj ekzempleroj la nova filmo pri la Centra Oficejo estis la plej furora varo. Inter libroj plej multe vendiĝis alia novaĵo, "Historioj... Rakontu!". Tiun ĉi kolekton de afrikaj rakontoj akiris 11 vizitantoj. La kompakta disko "jOmO slavumas", ankaŭ ĵus eldonita, vendiĝis en 10 ekzempleroj. La ĵurnalistajn rememorojn de Stefan Maul aĉetis 8 klientoj, dum kelkaj aliaj kunportis pli frue aĉetitan ekzempleron al la Malferma Tago por akiri aŭtoran aŭtografon. En 8 ekzempleroj vendiĝis ankaŭ "Plena manlibro de Esperanta gramatiko" de Bertilo Wennergren. Po 6 ekz. estis venditaj de la rakontaro "Amaro" de Sten Johansson, la bildstrio "Salutu la sinjorinon!", la kolekto de movadaj satiroj "Samideanoj", kaj "La vintra fabelo", nova Ŝekspira traduko de Humphrey Tonkin. Entute la libroservo vendis librojn kaj aliajn varojn por 2872 eŭroj. La venonta Malferma Tago de la Centra Oficejo okazos sabaton, la 25-an de novembro 2006.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

RETA OFICEJO DE REU

La retejo <reu.ru> estas refarata por iĝi la reta kunlabora medio por REU-membroj. Tio, kion oni povas vidi unue, estas la nova aspekto, sed estas nur laŭvoja ŝanĝo de formo por aldoni novan enhavon. La interna mekanismo estas plene refarita, dank' al kio aperis "Membra parto", kie momente la membroj povas kontroli, kiujn informojn REU havas pri iliaj adresoj, kaj – konsulti siajn REU-kontojn. Estonte aldoniĝos Aktuala Adresaro (kontaktadresoj de tiuj membroj, kiuj konsentas ilin publikigi), laŭbezone ankaŭ aliaĵoj. Krome, jam funkcias por la estraranoj kaj la kasisto la "Reta Oficejo" de REU, kiu ebligas facile vidi bezonatajn informojn pri la membraro de REU, prepari diversajn listojn, fari adreslistojn por paperpoŝta dissendado kaj okazigi retajn informdissendojn al la bezonataj kategorioj. Espereble estonte tio ankaŭ helpos al la aktivado de restarigota REJM. Dank' al la "Oficejo" multaj taskoj, kiuj antaŭe postulis horojn da preparlaboro (kaj pro tio ne ĉiam estis farataj), nun povas esti farataj per kelkaj musoklakoj.

ESPERANTO EN ELDONEJOJN!

Antaŭ jaro, en julio 2005, REU entreprenis la kampanjon "Esperanto – en eldonejojn!", kies ĉefa ideo estis proponi al la grandaj rusiaj eldonejoj eldoni E-lernolibrojn. Proprakoste, proprariske – kaj kun memstara disvastigo tra la komercaj retoj... Kiel argumento estis uzitaj la rezultoj de la plururba enketado inter rusianoj, kiu okazis en 2001, kiam triono de la respondintoj deklaris, ke studus E-on, se havus eblon por tio. La kampanjo okazis per dissendado de paperaj leteroj al kelkaj dekoj da eldonejoj, en kies eldonplanoj troveblis prilingvaj libroj aŭ lingvaj lernolibroj. La eltrovadon de la eldonejaj adresoj kaj la ekspedadon de la leteroj prizorgis moskvano Maksim Ĵitĉenko, aktivulo de EK MASI. Malgraŭ la ne vere allogaj startaj kondiĉoj (sed eble dank' al la interesaj argumentoj) REU fine ricevis interesitan reagon de unu el konataj eldonejoj. Aŭtune-vintre okazis traktadoj, gviditaj de la vicprezidanto de REU Nikolaj Gudskov kaj estraranino Irina Gonĉarova. Rezulte estis subskribitaj kontraktoj pri aperigo de kelkaj libroj – prezenta libro pri Esperanto ("La lando Esperantio. Poŝenciklopedio"), gramatiko, memlernilo ("Esperanto dum monato"), 500-vorta turisma vortareto kaj nova porkomencanta lernolibro (surbaze de "Gerda malaperis"). Ĉiuj aperos proksimume fine de ĉi somero. La planataj eldonkvantoj estas po 2000 (se la libroj rapide elĉerpiĝos, oni povos presi aldonajn kvantojn), kaj estas certa afero, ke ili estos vendataj ne nur en Moskvo, sed tra la tuta lando.

KIEL NI INTERKONATIĜU?

En REU estas membroj el la tuta grandega Rusio – kaj fojfoje el aliaj landoj. Iuj el ili povas viziti rusiajn E-renkontiĝojn kaj konatiĝi tie kun aliaj movadanoj, kutime loĝantaj en la sama landoparto. Sed en niaj kondiĉoj konatiĝi kun ĉiuj pere de E-renkontiĝoj – ne eblas. Vladivostokanoj ne veturos al tri-kvartaga aranĝo en Centra Rusio, aktivuloj el Suda Rusio tre malfacile povas atingi same mallongan E-aranĝon en Uralo... Ktp. Por helpi al ni ĉiuj ekkoni unu la alian, mi proponas re-

starigi la iaman praktikon de SEJM-2, kiun siatempe iniciatis kaj prizorgis Garik Kokolija, nun la redaktoro de REGo. Temas pri publikigo de mallongaj sinprezentoj – kun la fotoj – en nia bulteno. Se vi konsentas, bonvolu sendi al Andrej Grigorjevskij (str. Lenina 40-14, 429120 Ŝumerlja, Ĉuvaŝio, aŭ rete al <prezident@reu.ru>) respondon al la sekvaj demandoj kaj vian foton (laŭ via elekto, sed iel karakterizan).

La demandoj (kiuj celas konigi vin al aliaj REU-membroj): 1) Kiel vi lernis E-on? Kiu estis via E-instruisto? 2) Kio estas via nuna E-aktivado? 3) Kiajn servojn/informojn/helpon vi povus disponigi al aliaj REU-membroj? 4) Via ŝatata aforismo/proverbo? 5) Viaj rekomendoj por REU-agado?

DU NOVAJ ĈEFDELEGITOJ

Laŭ proponoj de la koncernaj Landaj Asocioj la Estraro de UEA nomumis du novajn ĉefdelegitojn. En Finnlando s-ino Päivi Saarinen, vicprezidanto de la landa asocio, anstataŭas s-inon Heta Kesälä, kiu plenumis la oficon dum 15 jaroj. D-ro Keyhan Sayadpour fariĝis ĉefdelegito por Irano, kie dum pli ol 10 jaroj la ofico vakis, ĉar laŭ la nuna regularo pri delegitoj, akceptita en 1995, ĉefdelegito povas esti nur en landoj kun landa asocio aliĝinta al UEA. La pasintjara akcepto de Irana Esperanto-Asocio kiel Landa Asocio de UEA ebligis restarigi tiun gravan oficon.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2006

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Moskva EK MASI (+5 membroj): *Gergeŝan Jevgenij, Kanarskij Ivan, Komarova Julija, Nikolajeva Natalja, Ovsjannikov Anton*

Samara E-Organizaĵo (13 membroj): *Agafonova L.I., Aleksejeva O.M., Alfjorova J.P., Jermolov S., Fejgin I.V., Kaplun J.A., Koĉergina R.I., Kuznecova J.N., Lisijenkova V.D., Poljanskaja J.V., Prilepskaja M.A., Purigina E.Z., Suslov V.G.*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Bojĉin Jevgenij (Birobiĝan), Kudrjavcev Viktor (Jekaterinburg), Kuznecov Miĥail (Tiĥvin), Medvedeva Marija (Saratov), Sudakova Aleksandra (Dimitrovgrad), Terjoĥin Vladimir (Jekaterinburg)

FAMILIAJ MEMBROJ

Kudrjavceva Rafija (Jekaterinburg)

Ĉe la adreso <http://reŭ.ru/dok/index.php?dok=membrolisto> ĉiam eblas vidi aktualan liston de la membroj.

KOTIZOJ DE REU POR 2006

Individua kotizo – 80 rubloj (por eksterrusiaj loĝantoj – 8 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron kaj/aŭ Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn

informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj.

Dumviva kotizo – 2000 rub. (por eksterrusiaj loĝantoj – 200 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 30 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Kolektiva kotizo – 30 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 160 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 120 rub. (ekster Rusio – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj, escepte de la aligitaj kaj familiaj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Membroj de REU aŭtomate iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn REGo-abonpagojn (poŝtmandate) sendu al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj kaj rabatitaj REGo-abonoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA. **(**Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <kasisto@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

En pola, do katolika urbeto, loĝis unusola judo. Ĉiun vendredon li ekstere rostis viandon por la vendredvespera manĝo. Sed al liaj katolikaj najbaroj estis malpermesite manĝi viandon dum vendredo, kaj la odoro furiozigas ilin ĉiun semajnon. La najbaroj decidis, ke ili devas konvinki la judon kristaniĝi por ne plu travivi tiun vendredan riton. Finfine ili sukcesis konvinki lin.

Li iris al la pastro, kiu instruis lin pri la katolika kredo kaj fine aspergis lin per sankta akvo, dirante: “Naskita kiel judo, edukita kiel judo, nun katoliko!”

La najbaroj estis ege feliĉaj, pensante ke ilia tentoproblemo estas finita.

Sed la venontan vendredon ili ree flaris la konatan odoron de rostata viando. Ili hastis al la domo de la judo, kiu denove estis rostanta viandon, kaj diris al li: “Kion vi faras? Ĉu la pastro ne instruis vin pri la malpermeso manĝi viandon vendrede?”

Tiam la judo prenis iom da akvo, aspergis la viandon kaj diris: “Naskita kiel bovo, edukita kiel bovo, nun fiŝo!”

(juda anekdoto de Josef Shemer)

Eksciu, ke...

LINGVA FESTIVALO – 2006

La vica, 5-a Lingva festivalo en Volgograd okazis la 9-an de aprilo en la Medicina Universitato.

Inaŭgurante ĝin, Anatolij Krasnokutskij – prezidanto de la klubo “Venko” – ebligis al la ĉeestantoj konatiĝi kun 32 “instruistoj”, kiuj planis fari kaj faris po 6 lecionoj de siaj gepatraj lingvoj. La salono kun 500 seĝoj estis plena kaj bone ornamita per infanbildoj, floroj kaj aerbalonetoj.

Post la inaŭguro ĉiuj disiris al klasĉambroj por vidi kaj aŭskulti la lingvoprezentojn. Dum tiuj lecionoj la vizitantoj eksciis multajn novajn kaj interesajn por si faktojn pri la hinda, malajzia, japana, taĝika, uzbeka, hispana, pola, kalmuka, armena kaj aliaj lingvoj. La “instruistoj” havis diversajn aĝojn, profesiojn, vivspertojn, tial ĉiuj lecionoj estis diversaj kaj neordinaraj. Ankaŭ la lecionoj de Esperanto, kiujn gvidis Oleg Ŝaronov, havis sukceson.



Post la lecionoj en la salono (denove plena) estis bona koncerto, kiu daŭris 1,5 horojn. Gejunuloj kaj plenaĝuloj de diversaj nacioj kantis, dancis en belaj diverskoloraj naciaj kostumoj. La spektantoj aplaŭdis al la artistoj laŭte kaj longe. Lasta ero de la koncerto estis la tradukita al Esperanto kanto de Jurij Vizbor “Mia amatin’” en plenumo de Maŝa Ŝaligina, Irina Mironova kaj Vika Dronova. Sur vizaĝoj de la aŭskultantoj videblis ridetoj kaj brilaj okuloj.

Ĉiuj “instruistoj” ricevis diplomojn kaj donacojn kun la emblemo de Lingva festivalo. Kun bona humoro la ĉeestintoj forlasis la festivalon kaj dankis la organizantojn: esperantistojn de la urbo, studentojn de la universitato kaj la urban komitaton pri junularaj aferoj.

Valentina Spicina (Volgograd)

INTERLINGVISTIKA KONFERENCO

La 26-27-an de oktobro 2006 en la ĉefurbo de Ĉuvaŝio Ĉeboksari, egide de la Ĉuvaŝa Ŝtata Universitato okazos regula scienca konferenco, dediĉita al fama ĉuvaŝologo (t.n. Aŝmarin-aj prelegadoj). Post plurfoja prezentado de interlingvistikaj

temoj kadre de tiuj simpozioj kaj aparte post sukcesa defendo de habilitacia disertaĵo far la subskribinto ĉe la sama universitato la organiza komitato proponis al mi lanĉi regulan interlingvistikan sekcion kadre de la nomita konferenco. D-ro M. Fettes (Kanado) sugestis, ke por la unua kunsidaro estu elektita ia "tegmenta temo", ekz.: "Atingoj kaj prioritatoj post la unua jarcento de moderna interlingvistiko". D-ro Blanke (Germanio) aldonis: "Universalaj lingvoj inter utopio kaj realeco". Ŝajne ambaŭ temoj kongruas. Do, la sekcio havu kiel "tegmentan temon" ilin kune: "Universalaj lingvoj inter utopio kaj realeco. Atingoj kaj prioritatoj post la unua jarcento de moderna interlingvistiko". Sed mi supozas, ke por la unua fojo eblus akcepti ajnateman materialon, nur ke ĝi estu sciencnivela kaj interlingvistika.

Senpere antaŭ la konferenco en la sama urbo okazos la 11-a Lingva Festivalo, kiun iniciatis kaj ĉiam plu prizorgas lokaj esperantistoj. La aranĝo vere estas partopreninda.

Kelkaj informoj pri la kondiĉoj:

1. Aliĝo estas senpaga.

2. Veturbiletoj, loĝado kaj nutrado – proprakoste.

3. Eblas partopreni la konferencon koresponde (sendinte sian artikolon por la kolekto, kiu estas regule presata kiel rezulto de ĉiu el la Aŝmarin-aj prelegadoj; kutime la materialoj aperas en la rusa lingvo jaron post la okazigo de la konferenco).

4. Ĉiuj prelegoj/artikoloj devas esti en la rusa. La akceptebla amplekso – ĝis 10 paĝoj A4, litertipo Times New Roman 14. La artikolaro estos eldonita de la universitata eldonejo.

5. Eblas eldoni ankaŭ apartan E-lingvan material-kolekton de la interlingvistika sekcio, eĉ antaŭ la konferenco (tiel ke ĉiuj partoprenantoj ricevus ĝin eke de la aranĝo mem). Sed tio postulus pagon (por rusianoj depende de la libro-amplekso – 100-200 rub.).

6. Dum kaj ĉirkaŭ la konferenco eventualas diversaj renkontiĝoj: kun lokaj sciencistoj, studentoj, esperantistoj ktp.

7. La urbo atingeblas per trajno el Moskvo, kiu veturas nokte kaj venas al Ĉeboksari matene.

8. Limdato por sendi kontribuon: la 15-a de julio (dezirinde retpoŝte; ĉiu kontribuinto havos ricev-konfirmon, ĉar iam-tiam retmesaĝoj perdiĝas survoje). Postaj kontribuoj povas ne aperi en la E-lingva versio. Limdato por la aliĝo: la 1-a de septembro. Eventualaj postaj aliĝoj traktendas individue.

9. Por ĉiuj pliaj kaj pluaj informoj skribu al: d-ro hab. A. Melnikov, <aleksmeln@mail.ru>.

Intertempe estas ricevita kontribuo de la prezidanto de la Germana Interlingvistika Societo d-ro hab. D.Blanke "Pri la kialoj de la relativa sukceso de Esperanto", promesis sendi sian artikolon laŭreato de Humboldt-premio d-ro prof. Duliĉenko (Estonio); estas kelkaj pliaj diverslandaj interesitoj, kiuj nun enketas pri siaj eblecoj partopreni ĉeeste aŭ koresponde.

bonvenige, d-ro hab. Aleksandro Melnikov (Rostov-na-Donu)

ESPERANTO-KONGRESO EN SUDAFRIKO

De la 27-a de aprilo ĝis la 5-a de majo 2006 en Muizenberg apud Kaburbo (Cape Town) okazis la 3-a Sudafrika Esperanto-Kongreso, kiun partoprenis esperantistoj el Sudafriko, Ganao, DR Kongo, Namibio, Zimbabvo kaj Pollando. La tutan tempon regis tre bona Esperanto-etoso ne nur pro tio, ke ĝi estis Esperanto-Kongreso, sed ĉefe pro tio, ke la partoprenantoj estis dekkelklingvaj kaj Esperanto bone tie plenumis sian rolon. Valoras substreki, ke en Respubliko de Sudafriko estas 11 oficialaj lingvoj pri kiuj statistiko de 2001 aspektis jene: zulua (23,8%), ksosa (17,6%) afrikansa (13,3%), norda sota (9,4%) angla kaj cvana (po 8,2%), suda sota (7,9%), conga (4,4%), svata (2,7%), venda (2,3%), ndebela (1,6%).

Dum publika diskuto pri plurlingveco Prof. Aleksander Navella el Universiatto de Kaburbo opiniis, ke plurlingveco estas necesa kaj nunan hegemonian pozicion de la angla en la mondo estonte anstataŭos alia lingvo – eble la ĉina (han) lingvo. Okazis ankaŭ Jarkunveno de EASA (Esperanto Asocio de Sudafriko), kurso pri Cseh-metoda instruado, kiun gvidis Oliver Mazodze el Zimbabvo, diskutoj pri uzado de Esperanto en Interreto. Prelegis Andrzej Grzebowski (Pollando) pri Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo kaj Esperanto-Turismo kun filmo pri vojaĝoj tra 42 landoj kun “Esperantotur”, Lucyna Sowinska (Pollando) pri Junulara E-Teatro “Studio P” el Torun kun filmo “Ni lernas vivi” kaj Oscar Sher (Sudafriko) pri judaj kutimoj.

La Kongreso okazis en bela kaj komforta kampadejo Zandvlei ĉe Falsa Bay en Muizenberg (ĉe la monto de Muizen – tre ĉarmaj bestetoj similaj al marmotoj, sed indiĝenaj). Ĉiutage okazis tre interesaj ekskursoj tra la belega Kabduoninsulo. Oni aĉetis fiŝojn en Kalk Bay kaj poste piknikis inter multaj pingvenoj en Boulders Beach. Ni vojaĝis al Kaba Pinto kaj Kabo de Bona Espero por vidi de rokoj samtempe Hindan kaj Atlantikan Oceanojn, ankaŭ observi antilopojn, zebrojn kaj atakemajn simiojn – pavianojn. Ni vizitis malriĉajn kvartalojn Langa kaj la riĉajn Marina de Gama en Muizenberg, ankaŭ la faman hospitalon de transplantado. La naturrezervejon Rondevlei kun 230 specioj de birdoj montris al ni botanike kaj ornitologie tre sperta Axel Von Blottnitz. Forta vento timigis hipopotamojn, kiujn ni ne povis vidi, sed ni piknikis tie kun antilopaj, strutaj kaj bovaj viandaĵoj. Pluan tagon ni dediĉis al la plej granda afrika Botanika Ĝardeno Kirstenbosch, atlantika marhaveno Hout Bay, mara banloko Camp-s Bay. Tutan tagon ni elspezis por vizitado de Kaburbo kaj ĝiaj historiaĵoj. Ni ekskursis per kabloveturilo al Tablo Monto por spekti belajn vidindaĵojn, al Paarl-urbo por vidi monumenton de afrikansa lingvo, gustumadis fromaĝojn kaj vinojn en Fairview, vizitis Stellenbosch – pitoreskan universitaturbeton kaj ĉefurbon de vinejoj. La lastan tagon ni vizitis Waterfront en Kaburbo kun ĝia Akvario de du Oceanoj kaj ŝipekskursis tra Haveno de Kaburbo renkontante plurajn fokojn.

Dum dek tagoj ni ne nur kongresis kaj multe diskutis, sed dank’ al tre bona akcepto kaj Esperanto-gvidado ĉefe de Magali, Haro kaj Axel Von Blottnitz ni multon vidis kaj lernis pri tiu fora regiono de Kabduoninsulo en Sud-Afriko.

Andrzej Grzebowski (Pollando), el <landa agado>

KONKURSO POR JUNAJ ORATOROJ ANKAŬ EN FLORENCO

En la 91-a UK en Florenco denove okazos Oratora Konkurso por junularo. La precizaj dato kaj loko estos anoncitaj en la Kongresa Libro. Rajtos partopreni gejunuloj ĝis 30-jaraj, kiuj aliĝis al la UK. Partopreno estos senpaga, sed la kandidatoj devos skribe anonci sin minimume unu tagon antaŭ la konkurso al la estrarano pri kulturo, s-ino Claude Nourmont <moonmont@pt.lu>.

La junaj oratoroj povos elekti inter kvar temoj:

– Kiel eduki al daŭrigebla evoluo?
– Renesanco metis la homon en la centron. Ĉu tio ankoraŭ validas?
– Kiu rolo por Esperanto en la sciencoj?
– Interreto kaj libereco.

Oni devos paroli pri la elektita temo libere, sen antaŭpreparita teksto, sed oni rajtos uzi memorigajn notojn. La maksimuma daŭro de parolado estos 10 minuitoj. La paroladojn oni taksos el vidpunktoj enhava, lingva, stila kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro. La plej bonaj konkursantoj ricevos libropremiojn.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

STUDO-TAGO HONORE AL BRUNO MIGLIORINI

Akademio de Esperanto, kunlabore kun la Akademio de la itala lingvo (Accademia della Crusca), Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj la Universitato de Florenco, aranĝos studo-tagon honore al la fama lingvisto Bruno Migliorini (1896-1975). Migliorni estis preskaŭ tri jardekojn profesoro en la Universitato de Florenco kaj longtempe prezidanto de Accademia della Crusca. Li lernis Esperanton en 1912. En 1985 aperis lia esearo "Lingvaj aspektoj de Esperanto".

La studo-tago havos la temon "Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo". La tuttaga aranĝo okazos senpere antaŭ la 91-a Universala Kongreso de Esperanto – vendredon, la 28-an de julio, en la Universitato de Florenco (Universita' di Firenze, Facolta' di Lettere e Filosofia, Piazza Brunelleschi, 3-4).

Oni antaŭvidas prelegojn de italaj lingvistoj en la itala kaj de esperantistaj interlingvistoj en Esperanto. Sinanoncojn pri temoj ligitaj al interlingvistiko kaj esperantologio, laŭeble, sed ne nur, en rilato al Bruno Migliorini, oni sendu al Renato Corsetti, Via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina, Italio; <renato.corsetti@esperanto.org>. Sinancojn pri simpla partopreno sen prelego oni ankaŭ bv. sendi al la sama adreso.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

LETERVESPERU EN LA ANTIKVA SAMARKANDO

Aŭguste kaj septembre 2006 samarkandaj esperantistoj okazigos la internaciajn letervesperojn, dediĉitajn al la 15-jariĝo de sendependeco de Respubliko Uzbekistano kaj al la 2750-jariĝo de Samarkando, listigita en la registro de la Monda Heredaĵo de Unesko. Ni atendas viajn gratulmesaĝojn, kaj, se eble, ĉiuspecajn (kaj ĉiulingvajn!) materialojn (leterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp) pri Uzbekistano kaj

Samarkando. Fakte, ĉio ajn pri la temoj, inkluzive fotojn de stratoj, vendejoj, restoracioj, hoteloj, komunumoj, kompanioj, varoj ktp estos tre bonvena. La plej interesajn materialojn ni publikigos en nialanda gazetaro. Ĉiuj senditaĵoj estos eksponataj en la speciala ekspozicio. Anticipan dankon por viaj kontribuoj!

Salutleterojn kaj alispecajn materialojn bonvolu adresi jam nun al: Anatolij Ionesov, Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, p/k 76, UZ-140100 Samarkando, Respubliko Uzbekistano. Vi povas ekscii pli multe pri la muzeo pere de la ttt-ejoj:
<http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html>,
<http://www.civilsoc.org/nisorgs/uzbek/peacemsm.htm>,
<http://satamikarohm.free.fr/article.php3?id_article=357>,
<http://peacetur.freenet.uz>.

Kontaktadreso: <imps86@yahoo.com>.

Anatolij Ionesov (Uzbekio)

ESPERANTO KAJ MARATONO



Unu el miaj hobioj estas kurado, pri kiu mi komencis okupiĝi samtempe kun Esperanto en fino de la sepdekaj jaroj. Por multaj komencantoj, kiuj finis E-kursojn, estas celo: partopreni en E-renkontiĝo, kaj poste – viziti almenaŭ unufoje Universalan kongreson. Same por kuristoj estas celo trakuri maratonon (42 km 195 m) kaj, se estos ebleco, ankaŭ internacian.

Ofte esperantistoj komencas "kolekti" renkontiĝojn, ĉar tie ili ne nur plibonigas sian lingvan nivelon, sed ankaŭ amikiĝas kaj ripozas en bonega etoso. Inter maratonistoj ankaŭ estas "kolektantoj", kiuj strebas viziti multajn maratonojn por renkontiĝi kun kolegoj kaj denove venki sin, fininte tiom longan kaj komplikan distancon.

Mian unuan maratonon mi kuris en Moskvo en 1989, kaj en 1994 aperis ebleco unuafoje partopreni en internacia maratono, kiu komenciĝis en la urbo Lappeenranta (Finlando) kaj finiĝis en Viborg (Rusio). Veninte al tiu malgranda urbeto, ni havis iom da libera tempo, kaj mi trovis lokajn esperantistojn, kiuj varme min akceptis, malgraŭ ke estis surprizitaj de mia hazarda veno, kaj afable montris al mi la urbon kaj helpis fari aĉetojn en vendejo. Kaj poste mi ĉiam faris Esperanto-kontaktojn dum miaj internaciaj sportaj vojaĝoj. En la jaro 2000, kiam mi kuris 30 km en Stokholmo, mi parolis kun Nataŝa Berce kaj Nataŝa Gerlaĥ. En 2001 min invitis kuri maratonon de libereco niaj amikoj esperantistoj el la ĝemelurbo Hérouville Saint-Clair, kaj mi antaŭ la maratono partoprenis en kongreso de francaj es-



perantistoj en Limoges. En 2004 mi ree venis al Francio por kuri la saman maratonon, sed aldonis ankaŭ maratonon de monto St.Michel, kie min akceptis esperantistoj el la urbo Saint-Malo. Post du semajnoj mi jam kuris maratonon en Turku (Finlando) kaj havis tie aferan renkontiĝon kun unu el lokaj esperantistoj. Kaj sekvatage en Stokholmo mi renkontiĝis kun Ĵomart kaj Nataŝa.

Mi jam delonge revis trakuri Parizan maratonon, kaj jen finfine mia revo realiziĝis. En aprilo de 2006 mi faris mian vican vojaĝon al la belega Francio, kaj denove dank' al helpo de niaj ĝemelurbanoj. Same kiel pasintfoje, mi decidis "mortigi du leporojn": kuri dum semajno du maratonojn – kaj trovis oportunan por mi maratonon de Cheverny. Kun helpo de Jarlibro de UEA, adresaroj de renkontiĝoj kaj Interreto mi trovis gastigantojn. En Orlean min varmege akceptis la familio de Pierre Dieumegard, lia edzino kaj filino ankaŭ bone parolis en Esperanto, nur kun filoj mi uzis la francan lingvon. Mi partoprenis en inaŭguro de nova sporta halo, kie mi donis intervjuon (en franca – tamen menciante Esperanton), konatiĝis kun nova por mi urbo kaj sekvatage jam kuris maratonon apud la kastelo Cheverny. Estante en Francio mi ne povis ne veni al nia ĝemelurbo, kie mi havas multe da amikoj. Eĉ dum mia tre kurta restado (1,5 tagoj) mi hazarde renkontis surstrate 6 konatojn. Sed mia ĉefa celo estis tamen Pariza maratono, kaj por mi estis tre oportune, ke mia gastiganto Aleks Kadar (kun kiu mi konatiĝis en Limoges) loĝas je 100 metroj for de la starto de tiu maratono. Mi ne nur prepariĝis por kurado, sed aktive partoprenis en Esperanta vivo. En la sidejo de Franca E-asocio dum renkontiĝo kun miaj jam malnovaj amikoj mi rakontis pri nia klubo, montris fotojn kaj filmojn. Mi partoprenis en radioelsendo de loka E-radiostacio kaj eĉ en disdonado de kalendaretoj kun reklamo de la internacia lingvo. En nia lando mi eble estas sola esperantisto inter maratonistoj (kaj sola maratonisto inter esperantistoj), sed en Parizo mi renkontiĝis kun du samideanoj, kiuj havas maratonan sperton. Kaj tiu afero certe indas partoprenon – 42 km en centro de unu el la plej belaj urboj de la mondo kun 31616 kuristoj (mi estis en la unua parto kun la 13638-a loko), varma subteno de spektantoj dum la tuta distanco, bona organizado. Mi denove antaŭ maratono donis 10-minutan intervjuon, sed ne scias ĉu aperis ĝi ie, ĉar miaj vortoj foje estis tro kuraĝaj.


Miaj mallongaj ferioj rapide finiĝis, kaj mi revenis al la kutima vivo. Tamen mi certas ke iam ripetos similan vojaĝon, ĉar kun apliko de Esperanto tion eblas fari pli facile kaj interese.

Aleksandro Belov (Tiĥvin)

la verda KoRo

kultura revuo

HISTORIO DE SCIENCO KAJ TEKNIKO – LIBROFORME



C.Minnaja, A.Ŝejpak. Elektitaj lekcioj pri historio de scienco kaj tekniko: Lernilo. Moskvo: MGIU, 2006. 251 p.

Ĉe la eldonejo de Moskva Ŝtata Industria Universitato (MGIU) aperis tia libro, kiaj tre malofte aperas en Esperanto, precipe en nia lando. La libro konsistas el tri partoj: "Komenco de civilizacio", "Historio de matematiko" kaj "Hidraŭlikaj maŝinoj". La unuan kaj la trian partojn verkis profesoro de MGIU Anatolo Ŝejpak, la duan parton – profesoro de Padova universitato Carlo Minnaja. Kvankam la libro estas destinita unuavice por la studentoj de MGIU, specialiĝantaj pri la fako "Energimaŝinkonstruado", ĝi estas rekomendata por ĉiuj studentoj, lernantaj Esperanton fakultative. La recenzon pri tiu ĉi libro REGo planas aperigi en sekva numero.

jOmO slavumas

la nova KD de JoMo

Prenu belan pokalon kaj verŝu du fingrojn da cigana muziko, unu da jida, unu viglan gluton da roko, kaj dronigu la tuton en abunda bano de ritmoj kaj sonoj el slavaj landoj, sed precipe lasu jOmOn aldoni Esperanton kaj servi al vi tiun mirigan koktelon, kiu transportos vin en mondon tiom familiaran kiom konfuzigan ekde la unua gluto!



Tiu ĉi nova KD, konsumenda sen modero, estas fakte kvazaŭ duobla albumo de pli ol unu horo, kiu kunigas jOmOn, liajn fidelajn kamaradojn "Liberecanoj" kaj la ensemblon de tradicia slava muziko "Solniŝka". La ekzerco povus ŝajni hazardeca por tiuj kiuj konas la viglan kaj bazecan rokon "JoMo kaj LIBERECANOJ", kaj neniu alia certe majstrus ĝin per tiom

da brilo.

La rezulto estas unika sperto, kiu preskaŭ pensigus al ni, ke roko venas de Rusio aŭ Ukrainio, kaj, sen vere aŭdaci tion diri, rakontas tamen ĝian historion, neniigante samtempe kelkajn malnovajn limojn kiuj rezistas nur pro kutimo.

Se vi ne timas perdi viajn gvidomarkojn, do tiam tiu ĉi albumo estas por vi! Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi, bonvolu viziti la ttt-ejon: <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd82&lng=e>. Por aŭskulti prezenton de la disko, aperintan en Radio Polonia la 08.05.06, vizitu: <http://www.radioarkivo.org/vidu.php/3030>. Ni invitas vin aŭskulti ĝin, ĉar estis disaŭdigitaj pluraj muzikaj fragmentoj de la disko, kiuj bonege kaj sukcese bildigis la radio-prezenton. Profitu ankaŭ la okazon por danki pro tiaj interesaj kulturaj elsendoj Polan radion: <esperanto@polskieradio.pl>.

(per-esperanto-muziko)

LIRO-2006

La "Ondo de Esperanto" denove invitas ciujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso Liro. Liro-2006 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo.
2. Originala poezio.
3. Traduka poezio: Porinfanaj poemoj de Agnija Barto, okaze de ŝia 100-jara jubileo.
4. Traduka prozo (el la rusa lingvo): "Medvedj na vojevodstve" de Miĥail Saltikov-Ŝĉedrin.
5. Traduka prozo (el la angla lingvo): "A diagnosis of death" de Ambrose Bierce.

En la branĉoj 1–3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro, Halina Gorecka (236039, Kaliningrad, p/k 1205). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ la 15-a de oktobro 2006.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso <sezonoj@yahoo.com>. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm/>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2006. La organizanto ĝis la 1-a de januaro 2009 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en "La Ondo de Esperanto" kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka, sekretario de Liro-2006



APERIS LERNILO POR RUSLINGVAJ PROGRESANTOJ "ESPERANTO POR HARFENDULOJ"

Eldoneje de la Rostova Instituto de Fremdaj Lingvoj aperis la 1-a parto de la lernilo "Esperanto por harfenduloj": ***Эсперанто для дотошных. Грамматика эсперанто (о серьезных вещах серьезно и не очень). Ч 1. Алфавит. Правила чтения и письма. Имена существительные.*** La libro enhavas leĝerstilan prezenton de la E-a gramatiko (kun aparta atento al malsamaĵoj inter la rusa kaj E-o) kaj plurajn "interludojn", dediĉitajn al diversaj aspektoj de la E-kulturo. La aŭtoro – Aleksandro S. Melnikov, speciala redaktoro – Viktoro S. Aroloviĉ, eldonkvanto – 300 ekz., amplekso – 168 p., ilustrita, prezo – 100 rub. Akireblas ĉe la aŭtoro: <aleks-meln@mail.ru> (post antaŭpago de 120 rub. inkluzive la afrankon).

Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu)

DU JAROJ DE KAPITANO POSTNIKOV

La 21-an de majo 2006 pasis du jaroj post la publikigo de la romano "Dek tagoj de kapitano Postnikov". Estas la kaŭzo por informi vin la lastan fojon, ĉar dum la dua jaro de sia ekzisto la romano eniris la vivperiodon memstaran, sufiĉe sendependan de la aŭtoro.

Pliaj du recenzoj aperis en "La Gazeto" № 120 (okt. 2005): funde, eĉ ĝisfonetike analiza de Mao Zifu kaj poemforma (!) de Nicolino Rossi. "Bulletin de l'Association Francaise des Russiants" № 38 (febr. 2006) publikigis koncizan informon pri la romano kaj aldone – unu paĝon, enhavantan ĉefe paralelajn tekstojn en la rusa kaj en E. Informita de Spomenka Ŝtimec kaj leginta la romanon serba aktoro Saŝa Piliroviĉ (li gajnis abundajn aplaŭdojn por la teatraĵo dum UK en Vilnius), skribis al mi, ke li bone imagas sin Aleksandro Postnikov kaj deziras prepari spektaklon surbaze de la romano. Dio lin helpu…

Tute eksteratende kaj senmende la romano estis tradukita en la rusan. Tion faris Anatolij Radajev proprainiciate. Mi dankas Anatolon. Espereble, la aperonta ruslingva versio trovos sian legantaron almenaŭ samkvante kiel la Esperanta.

En mia stoko restis por hodiaŭ nur iom pli ol kvar dekoj da ekzempleroj. Tio pensigas pri eventuala korektita reeldono, tamen ne tuja. Laŭ mi plej konvena dato por fari tion estos la 100-jara datreveno de la Unua Ruslanda Esperanto-Kongreso (majo 2010). Sendube, ĝis tiu dato la libro kun "Dek tacoj…" en la kovrilpaĝo estiĝos enviinda posedaĵo de legoŝatantoj. Ĉi-jare mi pretas vendi la restintajn ekzemplerojn kontraŭ speciala prezo. Por bibliotekoj unu ekz. estas donacota laŭpete.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

Februaro: Ne nur "Bela".



Lena Karpunina. "La Bato". Kolekto de rakontoj. 160 p. Prezo 60 rubloj.

Premiito de Belartaj Konkursoj de UEA, Lena Karpunina estas jam bone konata por eksterlada leganto kiel agnoskita majstro de rakontoj. De ĉi jaro ŝi aperas ĉe la rusiaj revuoj REGo kaj "Scienco kaj Kulturo" jam ne kiel gasto, sed kiel konstanta loĝanto de literaturaj paĝoj. La dua, reviziita kaj pli ampleksigita eldono de ŝia libro "La Bato" (1-a eld.: Antverpeno, 2000) enhavas 18 rakontojn – 15 publikigitajn antaŭe kaj 3 novajn. Tiun eldonon la aŭtorino speciale dediĉis al rusiaj esperantistoj.

Dum la legado mi dividis la rakontojn de Lena je du specoj: emociplenaj kaj sinceraj rakontoj pri infaneco kaj juneco en sovetunia suda urbo kaj rakontoj pri stalinaj koncentrejoj.

Multaj samaĝaj legantoj el eksa Soveta Unio rekonos en la rakontoj de la unua parto propran junecon. Multaj havas similajn rememorojn el ĝi, ĉe multaj estis sia Polina Andrejevna (la rakonto "Instruistino") kaj valoraj, sed klopodigaj donacoj ("La motorciklo"). Tamen, la rakontoj ne estas dolĉe-amorfaj. En ili ĉeestas kruda vero de ekzistado, kio evidentas, fakte, jam el la titolo de la libro.


La duan parton dekomence mi ne tre atentis. Dum la lastaj jaroj la temo de reprezalioj sub Stalina gvido iĝis tiom ofte traktata en la ruslingva kaj parte en la Esperanta literaturoj, ke ĝi preskaŭ superis ĉiujn aliajn temojn. Sed dum la legado iel venis la penso, ke la aŭtoro, ĉu hazarde aŭ konscie, en tiuj rakontoj transiris tre gravan Rubikonon ne nur en la Esperanta, sed ankaŭ en la monda literaturo. La limon, kiam la tempo de priskribitaj okazintaĵoj por aŭtoroj iĝas jam historio. Lena kvazaŭ transprenas stafetan bastoneton de aŭtoroj-atestantoj de tiuj eventoj, por daŭre porti tiun gravan temon en literaturo.

La rakontoj de Lena Karpunina kun tuta klaro montris al mi, ke plenaperis la nova generacio de legantoj, kiuj ne nur ne estis atestantoj de la Stalin-periodo, sed jam ne spertis eĉ la vivon en Soveta Unio.

Marto: Legendaj "Legendoj".

Mikaelo Bronŝtejn. "Legendoj pri SEJM". Tria ampleksigita eldono. 232 p. Kun fotoj. Prezo 140 rubloj.

Kiujn aldone laŭdajn vortojn mi povus diri pri la aŭtoro, kiu dum multaj jaroj preskaŭ sola tiras la malfacilan ĉaregon de profesia verkisto kaj tradukisto en Rusio. Al legantoj, kiuj asertas, ke ili jam havas unu libron de Bronŝtejn, mi povas nur



suflori, ke tiu ĉi tria eldono de "Legendoj" estas sesdekprocente pli granda kaj nova.

Speciala averto por junaj esperantistinoj: ne atentu la foton de la aŭtoro sur la lasta kovrilpaĝo de "Legendoj"! Tia Mikaelo estis en 1960. Nun li pli similas al Leo Tolstoj sur ties klasikaj portretoj.

Aprilo: "Sekreto" de la nova aŭtoro.

Valerij Sipoviĉ. "Sekreto de la patrino". Novelo. 112 p. Prezo 70 rubloj.

La eventoj de la novelo okazas en 1918-1945. Malgraŭ la priskribata eksplodiga tempoperiodo – revolucio, mondmilito, – en la novelo ne temas pri persekutoj aŭ militaj teruraĵoj. Tio estas rakonto pri la sorto de virino, pri ŝia amo, esperoj kaj malsukcesoj. La novelo estas lirike kortuŝa, en ĝi sub la tondra ĉielo de militaj jaroj vivas kaj pace interrilatas kaj ĉiam ebrieta muĵiko-koĉero Kuzjma, kaj ruĝarmeano Nikolo, kaj intelektulino Varvara Miĥajlovna. La libro kvazaŭ memorigas al ni, ke krom dekmilionoj da persekutataj dum stalinaj reprezalioj homoj, estis ankaŭ centmilionoj da aliaj, kiuj "malfeliĉis" ne trafi la koncentrejojn. Kvankam ilia sorto estis firme ligita kun tiu periodo de militoj kaj persekutoj, sed ne tio estis ĉefa en ilia vivo. La aŭtoro montras, kiel unu fulmrapida epizodo povas abrupte ŝanĝi la tutan sekvantan vivon ne nur de la ĉefaj herooj, sed ankaŭ de iliaj proksimuloj. Legante, ni komencas kredi, ke efektive ekzistas fato de vivo, en kiu senteblas eĉ ia enigma Dia providenco.



La novelo tute ne estas verkita en iu aventura aŭ detektiva ĝenro. Sed ĝuste sekreto de la patrino senvualiĝas sur la lastaj paĝoj de la libro.

Ŝajnas, ke la senduba multepromesa talento de la aŭtoro unumove povus transformi la novelon kaj en 10-paĝan rakonton, kaj en 300-paĝan romanon, disvolvante la priskribojn kaj nuancojn.

La librojn vi povas aĉeti ĉe la eldonejo: <impeto@impeto.ru>; ĉe Moskva Esperanto-Centro: <mec@rusio.ru>.


Aleksandr Ŝevĉenko (Moskvo)

FREŜA AERO DE LA RAKONTOJ

"La bato" de Lena Karpunina

La libron konsistigis 18 rakontoj de vera verkisto. Pri infanoj kaj plenaĝuloj, libero kaj mallibero, montoj kaj tero, bono kaj malbono.

La veran verkiston distingas la kapablo rakonti pri io timiga sen timigi la legantojn. Dum legado pri mortpafitaj sortoj de malliberuloj ("Miŝka Voropajev", "Mirt", "La linko", "Tiu tago", "La persekuto"), de pacaj taĝikaj junulinoj ("Mortpafitaj pomoj"), de "libera" Jaŝa ("Jaŝa"), de orfino Bela ("Bela") kaj de forlasita de la patrino Julja ("La ridinda letero") ĉiam restas io bona, ia espero je plia bono – "serenas mia trist'"[1]. Tiun ĉi efikon kaŭzas la verkista talento, kunigita kun granda homama koro, kiu varmigas ankaŭ la stilon.



Krome, la vera verkisto scias rakonti pri tio, kion li mem ne spertis. Lena ne estis reprezaliita, ne scias la vivon de la stalina koncentrejo kaj tamen priskribas ĝin tiel konvinke, kvazaŭ ŝi ĉion travivis kaj ne povis forgesi. Kaj vere linko persekutas du fuĝintojn ("La linko"), la aŭdaca Mirt flugas per skioj al la libero ("Mirt"), bagnuloj paŝas laŭ bestaj padoj de la virga tajgo ("Tiu tago")...

Kaj, memkompreneble, la vera verkisto nepre pensigas la legantojn. Pri la vivo, unuavice pri la homo inter homoj – ne trude-krude, sed amikece-delikate. Ĉu la timo bone edukas? Ĉu timanto povas ami aŭ estimi timiganton, kio ajn tiu estus ("La patrino kaj la filino", "La instruistino")? Kial Miŝka Voropajev estis enprizonigita, se li estis ne krimulo, sed viktimo de la vera krimulo – la patro ("Miŝka Voropajev")? Ĉu savi aŭ ne savi la memfidan persekutanton – ĉu helpi aŭ ne helpi al li plu murdi senkulpajn homojn ("La persekuto")? Ĉu mensogo ĉiam estas malbona kaj punenda ĝis preskaŭ murdo? Ĉu la patro ne komprenis, ke ankaŭ la edzino mensogis, dirante, ke la eta filino legis, por laŭeble liberigi ŝin de la turmenta legado ("La bato")? Kiu fakte malgajnis: ĉu la patrino de tri infanoj, forlasita de la edzo, sed restinta fortanima kaj vivopreta, aŭ li, en kies "nova vivo" nepre aperos abundo de komplikaĵoj, kiujn li ne kapablos venki ("La adiaŭo")? Kio estas "verda animo", kiu faras la homon "fidela al Esperanto" ("Anakondo")? Ne ĉiuj komprenos kaj akceptos okazintaĵojn en la rakontoj tiel, kiel ties herooj. Des pli interesaj kaj altiraj estas la rakontoj.

---

[1] El la versaĵo de A.Puŝkin, tradukita de M.Giŝpling.

Dideroto diris, ke la arto estas trovi la neordinaran en la ordinara kaj la ordinaran en la neordinara. Do en la rakontoj de Lena la legantoj vidos la ordinaran drinkulon kun neordinara homamo (“La ridinda letero”), la ordinaran pluvon, kiu donacas neordinaran animliberiĝon (“Paska pluvo”), la neordinare majestan montaron, kie ordinare vojaĝas esperantistoj kaj loĝas ordinaraj gastamaj homoj (“En la montaro”).

Esperanto de “La bato” estas perfekta – ĉiutaga, sed riĉa, simpla, sed belega. La libro rememorigas pri ĉiu el sep lagoj en la montaro, kiuj fascinas per siaj koloroj kaj pureco. Bonan legadon, do, al ĉiu samideano – sendube ĝi vere estas ĝuige bona!

Mi diru pri “La bato” ankaŭ verse:

Admiroplene legis mi “La baton”,
Kaj ĝia Esperanto ravis min.
La homajn vivon, karakteron, faton
Rakontas korvibrige l’ verkistin’.

Montaro sorĉas per majestaj altoj,
Ridetas laga verdeblua hel’,
Sed la fluanta viv’ sen ĉes’ kaj haltoj
Avara estas pri favor’ kaj bel’.

Dubindas la sugesto fortinklina
En la bonkore konfidiga form’:
Ĉu kunigeblas tim’ kaj am’ filina?
Ĉu batoj de patrino estas norm’?

Spiritmortige densas la ĝangalo
Gulaga. Nek esper’ nek iluzi’?
“La persekut’” okazis en realo –
Ne en la multimpresa fantazi’!

Sukceso benas volon la elstaran,
Kaj la murdonton trompas lia sort’.
Ĉu indas perdi tempon tiom karan
Por ke indulgu lin la justa mort’?!

Per kio Jaŝa la najbarojn ĝenas?
Al kiu lumas la riĉega dom’?
Je timo kaj dolor’ la vivo plenas,
Kiel leter’ de l’ orfigita hom’...

Animoj verdaj – kiaj ili estas?
Pri kio diras bel’ de la esprim’,

Se Esperanto diversega restas
Laŭ lernocel', uzad' kaj ĝia lim'?

Vi ne suferis la reprezalion,
Sed en la libro krias ĝia vort'.
La verk' talenta povas diri plion
Ol propra spert' havigas al la sort'.

Helige, kiel voĉ' de la amato,
Salutas la verdlingva harmoni'.
Mi dankas Vin plej kore pro "La bato",
Sen kiu vere multon perdus mi.

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

La Urbestraro de Montpellier (Francio) eldonis sian retpaĝaron <www.montpellier.fr> en pluraj lingvoj, inter kiuj estas Esperanto. La Esperanta paĝaro legeblas ĉe <http://eo.montpellier.fr/18-accueil.htm>. ***(esperanto-l)***

La 24-an de aprilo forpasis **Gurgen Ĉobanjan** *(Guĉo) (1961-2006), aktiva armena esperantisto, kantisto, tre talenta kaj gaja persono. La 8-an de majo forpasis* **Talis Bercis** *(1953-2006), konata latvia esperantisto, organizanto de E-aranĝoj kaj aktivulo de Latviaj E-organizaĵoj. Ilin ambaŭ multaj niaj spertaj esperantistoj bone memoras de "la tempoj de fama BET" kaj ne malpli fama OkSEJT.*